

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Stefan MacGill

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj

de la aktuala numero:

Monique Arnaud

Magdalena Feifičová

Heidi Goes

Mireille Grosjean

Yinbao Huang

Marija Jerković

Zsófia Kóródy

Ilona Koutny

Anna Löwenstein

Stefan MacGill

Rob Moerbeek

Radojica Petrović

Zlatko Tišljar



ilei

ENHAVO

Jozefo NÉMETH: <i>Enkonduko</i>	3
Mireille GROSJEAN: <i>Nova elano por Juna amiko</i>	4
Mireille GROSJEAN: <i>Bezonata sed ne nepre agrabla laboro</i>	5
Mireille GROSJEAN: <i>Belega eblo membriĝi: valida por ĉiuj</i>	6
Magdaléna FEIFIČOVÁ: <i>Dekalogo de bona IPR-abonanto</i>	7
<i>Por via notlibro: alvokoj el Pollando (UAM) kaj Germanio (AGEI)</i>	9
Anna LÖWENSTEIN: <i>Sen lernolibro – ĉu vere preferinde?</i>	11
Zlatko TIŠLJAR: <i>Graveco de tuja lingva praktiko post E-kursoj</i>	14
Rob MOERBEEK: <i>Erarologio aŭ infektaj malsanoj en nia lingvouzo (II.)</i>	15
HUANG Yinbao „Trezoro”: <i>Angla lingvo perfortas ĉinajn lernantojn (II.)</i>	20
Mireille GROSJEAN: <i>Konkurso 2014</i>	25
<i>El la landoj kaj sekcioj (CZ, DE, HU, ID, HR, NL, TL)</i>	26
<i>Nekrologo pri A. (Ton) Verwoerd</i> (Rob MOERBEEK).....	33
Monique ARNAUD: <i>Raporto por ILEI rilate al la Ĝenerala Konf. de UNESKO</i> ...	35
<i>Modernaj edukaj metodoj kaj teknologioj</i> (recenzo de Stefan MACGILL).....	36
<i>Informoj pri ILEI kaj nia redakcio</i>	38
<i>47-a Konferenco de ILEI en 2014 (informoj, aliĝilo)</i> (Radojica PETROVIČ).....	40

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 7969 709 66. Rilatoj kun Unesko kaj FIPLV. Reprezentanto de ILEI ĉe UEA.

Unua vicprez.: Zsófia KÖRÖDY, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. <zsofia.korody@esperanto.de>. Tel./fakso hejmaj: (+49) 5521-5983. E-centroj, ekzamenoj, ALTE.

Dua vicprez.: GONG Xiaofeng „Arko”, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031 Nanchang, Ĉinio. <arko.gong@qq.com>. Universitatoj.

Estrarano pri financoj: William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.

Sekretario: Radojica PETROVIČ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <ilei.sekretario@gmail.com> por sekretariaj aferoj, <radojica.petrovic.rs@gmail.com> alie. Tel. hejma (+381) 32 371053. Konferencoj, rilatoj kun TEJO.

Vicsekr.: Magdaléna FEIFIČOVÁ „Fejfi”, Bernolákova 25/5, SK-010 01 Žilina, Slovakio. <ilei.officejo@gmail.com>. Membro-administrado. Rilatoj kun FEL.

Estrarano: Bharat GHIMIRE, G.P.O. Box 10518, Kathmandu, Nepalo. Tel. (+1) 620 9877. <nespa.1990@gmail.com>. Universitatoj. Komisiito por helpi al aliĝpetoj.

Estrarano: Enikő ZENGŐ SEREGHY, Dózsa u.14. 2/8, HU-4400 Nyíregyháza, Hungario. <enimyster@gmail.com>. Tel. portebla: (+ 36) 203234365.

Kalendaro, ekzamenoj, multlingva paĝaro www.ilei-mondo.info, varbado.

Estrarano: Penny VOS, Aŭstralio <penivos@yahoo.com>. Lerneja agado.

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford; AdE¹
Vicprezidanto: Detlev Blanke,
Germanio, Prezidanto de la Societo
pri Interlingvistiko

Membroj:

Vera Barandovská-Frank, Germanio,
Universität Paderborn; AIS²
Duncan Charters, Usono, Principia
College, Elsah
Renato Corsetti, Italio, Università degli
Studi di Roma „La Sapienza”; AdE¹
Probal Dasgupta, Barato, LRU, Indian
Statistical Institute, Kolkata; AdE¹
Michel Duc Goninaz, Francio,
Université de Provence; AdE¹
Alozas Gudavičius, Litovio, Šiaulių
universitetas
Wim Jansen, Nederlando, Universiteit
van Amsterdam
Boris Kolker, Usono; AdE¹
Ilna Koutny, Pollando/Hungario,
Uniwersytet im. Adama Mickiewicza
w Poznaniu; AdE¹
Maria Majerczak, Pollando, Uniwer-
sytet Jagielloński w Krakowie
Geraldo Mattos, Brazilo, Federacia
Universitato de Paranao; AdE¹
Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия
Сельскохозяйственного
Машиностроения
Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet
u Kragujevcu
Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

Sekretario: Aida Čižikaitė, Litovio

¹ AdE – Akademio de Esperanto

² AIS – Akademio Internacia de la
Sciencoj, San-Marino

Fotoj sur la eksteraj kovriloj

Titolpaĝe: nova elano por *Juna amiko*
(p. 4).

Dorskovrile supre: *satelita foto pri la
regiono de Montevideo*; malsupre:
Ateneo, nia konferencejo en 2014

Enkonduko

Karaj Legantoj,

nia frato-revuo, **Juna amiko**, havas
novajn redaktoron kaj esperojn. Kara
Stano, bonvenon surŝipe (vd p. 4)!

Du trionoj de la enhavo de nia
nuna numero venas el la klavaro de la
estraranoj kaj sekciestroj. Grava parto
de tiuj kontribuoj temas pri la interna
vivo de ILEI: vd ekz. la unuajn tri
artikolojn kaj la **fotokonkursan al-
vokon** (p. 25) verkitajn de Mirejo kaj la
inviton de Radojica Petrović al nia
sekvajara Konferenco en Montevideo.
Sur p. 41 vi trovas ankaŭ la **aliĝilon
por la 47a Konferenco**, sed baldaŭ ĝi
aperos en nia retpaĝaro *ilei.info*.

La estraro kaj IPR mem volas servi
la membrojn. Sed por ke ni povu servi
vin pli bone, ankaŭ vi povas helpi: vd
la dekalogon de Fejfi, nia membro-
administranto (p. 7), kiu en 10 punktoj
resumas la ecojn de la „**bona IPR-
abonanto**”. (Kaj ne forgesu ĝustatempe
pagi vian kotizon por 2014.)

Por fini, jen peto de la redaktoro:
estas delonga intenco, ke en IPR kune
kun la fotoj aperu ankaŭ la **nomo de la
fotinto**. Do, estonte, se eblas, sendu al
ni tiujn nomojn, kun preciza priskribo
pri tio, kion oni povas vidi sur la fotoj.
(Se la foton faris preterpasanto, sed per
via fotilo, la foto aperu kun via nomo!)
Dankon kaj bonan legadon!

Jozefo NÉMETH,
redaktoro

Nova elano por Juna amiko

Dum la jaro 2013 nia revuo *Juna amiko* iom lamis. Aperis unu numero en oktobro kaj aperos la dua en decembro. Do nekontentiga situacio, kiam la kutima aperritmo estas tri numeroj jare. La redaktisto de *Juna amiko* estis Stefan MACGILL, samtempe prezidanto de la Ligo; li havis abundajn taskojn. Nun estas tempo por ni danki lin pro lia laboro por la Ligo, en tiuj du funkcioj. En julio Stefan MACGILL elektiĝis en la estraro de UEA kaj fariĝis vic-prezidanto de ĝi. Li plu ligiĝas al ILEI estante la oficiala ligo, peranto, de UEA kun ILEI. Sed la redaktoran taskon li devis forlasi.

Ni estas tre feliĉaj, ke ni trovis ne nur taŭgan personon, sed elstaran kunlaboranton: Stano MARČEK el Slovakio. Li redaktis la revuon *Esperanto* de UEA, la organon de Slovaka Esperanto-Asocio, li redaktas la organon de Germana Esperanto-Asocio, verkis faman lernolibron jam tradukitan al pli ol 30 lingvoj, eldonas librojn ktp. Do la redaktado de nia revuo estos konata tasko por li, kaj teknike, kaj grafike, kaj enhave.

Juna amiko (JA) ne estas la tasko de ununura persono. Aro da kunlaborantoj regule liveras artikolojn, kantojn, desegnaĵojn. Plie novaj personoj anoncis sin por kunlabori. La tasko de Stano estos estri tiun orkestron. En tiu skipo kelkaj personoj havas regulan rubrikon, kvazaŭ kronikon, aliaj liveras foje artikolon unikan. Mi jam ekrilatis kun tiuj valoraj helpantoj por nutri ilian motivadon: ni bezonas, bezonos ilin pli kaj pli en la venontaj monatoj kaj jaroj.

JA estas tre grava ilo por la Ligo, por la instruistoj, por la lernantoj. Ni planas eldonon de kvar numeroj jare ekde 2014. Temas pri papera revueto. Jam ideoj naskiĝis pri retaj ekzercoj en ligo kun iu artikolo, pri kunlaboro kun famaj retejoj por lernantoj... Ni devas kaj pluivivteni la revuon kaj labori per modernaj metodoj; nur tiel ni sukcesos kontentigi la nuntempajn abonantojn sed ankaŭ akiri novajn abonantojn. La abono kostas 16 EUR por personoj en A-landoj kaj 11 EUR por personoj en B-landoj, kaj estas rabato ekde 3 ekzempleroj. Abonu, donacu abonon al viaj familianoj, konatuloj, varbu kaj kontribuu! Mendilo troviĝas sur nia retejo *ilei.info*.

Mireille GROSJEAN
Prez. de ILEI

Bezonata sed ne nepre agrabla laboro

Neniu ŝatas statistikojn,

Tamen **ni bezonas statistikojn!!**

Venas la jarfino, venas peto pri jarraportoj, pri konfirmo de aliĝoj, pri pago de kotizoj kaj similaj petoj pri neagrablaj taskoj. Tio samas en iaj asocioj tra la tuta mondo. Por ILEI havi tiajn faktojn en komputilaj dokumentoj **tre gravas**. Plie gravegas, ke tiaj listoj estu aktualaj. Pro tio ni aparte danku al Fejfi, estraranino pri membroprizorgado, kiu dediĉis –as, –os multajn horojn por teni nian membroliston en plej ĝusta kaj kompleta formo. Sed tiun taskon ŝi ne povas fari sola: bv nutri nian liston transdonante al ŝi aktualajn donitaĵojn! Ŝi kaj mi kune en Herzberg en septembro preparis demandarojn por vi, kiuj gigante helpas al ŝi. Jes, ŝi tenas la liston kaj scias, kion ŝi bezonas por fari tion efike. Konsekvence ni adaptis niajn dokumentojn, kiuj nun iras al vi sekciestroj kaj reprezentantoj. Kion ni devas havi? Membroliston kaj jarraporton. Tio estas peto al sekciestroj kaj reprezentantoj. Informoj pri novaj membroj, pri adresomodifoj, pri forpaso de membroj, pri modifo de sekcia komitato devas atingi Fejfi-n per *ilei-officejo@gmail.com*. Se vi uzas la ŝablonon, kiun ŝi sendas al vi, ŝi povos ŝpari multe da tempo. Se vi uzas vian propran ŝablonon, ŝi devos fiŝkapti la donitaĵojn kaj meti ilin en ĝustan lokon en sia tabelo. Do vi komprenas, pro kio gravas, ke vi sekvu la indikojn, kiujn ŝi sendas al vi.

La jarraportoj same bezonatas, por ke ni povu scii pri via agado, por ke ni povu aperigi pozitivajn agadojn por stimuli ĉiujn niajn legantojn per nia organo *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR), por ke ni povu proponi subtenon al iu malforta sekcio. Sur nia retpaĝo ni volas aperigi plenan liston de ĉiuj raporto. Sed la ĉefa uzo de niaj ciferoj kaj statistikoj estas aliloke. Kiel vi scias, ni estas en rilato kun internaciaj establoj: UNESKO, ALTE, FIPLV, UIA. Ni estas en rilato kun UNESKO ekde 1954 kaj pri tio ni festos en 2014 abunde. La ĉefa sidejo de UNESKO estas en Parizo kaj tie deĵoras nome de ILEI Monique ARNAUD kaj Jean-Pierre BOULET. Foje venas mi, depende de la kunsidoj. Tre gravas, ke ni aperu kaj povu doni freŝajn informojn pri nia movado kaj agado. Aperi ne ĉiam eblas, ĉar ĉiuj estraranoj havas siajn familion, kutimajn taskojn, profesion, sanproblemojn ktp, do ni devas ĵongli kaj trovi solvojn per esploro kaj kontaktiĝo kun la lokaj ILEI membroj aŭ samideanoj.



[*Surfote: s-ro BOULET en la ILEI-budo ĉe UNESKO*]

Por vi same tiuj statistikoj gravas. Se vi povas ekrilati kun edukministro aŭ iu gravulo, vi havu tiujn ciferojn en la memoro aŭ en la mano por uzi ilin en ĝusta momento kiel trafan argumenton. En via lando eble jam estas sekcio, kun respondeculoj; inter vi vi povas dividi la taskojn. Se ne estas sekcio, eble via lando havas reprezentanton, kiu raportas al ILEI regule. Tio gravas. En diversaj landoj ILEI havas nur unu aŭ du membrojn... Unu povas esti kontaktpersono,

do ekzistas ia ligo, unua fadeno, ŝnuro, kiu povos fariĝi kablo! Se vi estas esperantisto kaj deziras membriĝi al ILEI, kaze de financa problemo, vi povas, rajtas, membriĝi sen kostoj ĉar ni havas koleghelpan kason por tiaj situacioj. Ne timu uzi ĝin. Tiel vi regule ricevos nian revuon IPR. Tamen vi devos anonci vin ĉiun jaron por plu ricevi ĝin. (Vd la artikolon pri Koleghelpa Kaso sube.)

En tiaj kunsidoj ni/vi povas diri: ILEI havas piedon en 55 landoj!! UEA havas 70 landajn kaj 55 fakajn asociojn. Estas E-parolantoj en pli ol 125 landoj. Nun estas pli ol 188 000 artikoloj en E-a vikipedio, proks. same multe kiel en la turka aŭ en la dana... Tiuj ciferoj estas kugloj en nia batalo por obteni agnoskon!! Bv. iri al *ilei.info* kaj adicii la sekciestrojn, reprezentantojn kaj kontaktpersonojn. Pro la elekto de reprezentanto en Slovakio, ni havas nun piedon en 56 landoj. Mi proponas celon, ke en nia 47a Konferenco en Urugvajo en julio 2014 ni atingu 60 landojn!!!

Mireille GROSJEAN, prez de ILEI

Belega eblo membriĝi: valida por ĉiuj

Ĉiuj povas imagi, ke la pago por membreco en ILEI ne eblas por ĉiuj en la mondo. Pro tio kelkaj el niaj membroj, aliaj subtenantoj kaj mecenatoj donacas monon por helpi al membrigo de kolegoj en evolulandoj. Por kolekti tiajn donacojn ILEI kreis kason, kies nomo estas

„KOLEGHELPA KASO”

Uzante tiun monon ILEI povas esti, resti en kontakto kun multaj instruistoj en Azio, Afriko, Ameriko, sendepende de la situacio de tiuj kolegoj.

Nun: kiel funkcias tiu sistemo?

Ekzistas regularo pri tiu kaso, legebla en nia retejo www.ilei.info, paĝo „Dokumentoj”, poste „Gvidiloj”, poste „Gvidilo pri Koleghelpa Kaso”. En tiu gvidilo ni malkovras, ke la ricevanto de tiu kontribuo devas anonci sian deziron membriĝi kaj ricevi la revuon *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR) ĉiun jaron antaŭ la 15a de januaro. Ne temas pri peto, tute ne. Temas pri ŝparemo flanke de ILEI. Fakte povas okazi, ke iu persono migras al alia lando, aŭ ne plu interesiĝas, aŭ eĉ forpasas. Okazus, ke ILEI sendus dum jaroj nian revuon uzante altajn sumojn por afranko, al iu adreso, kie ne plu estas esperantisto. Pro tio aperas en tiu regularo la postulo, ke la persono, kiu kutimas ricevi IPR-n aŭ deziras ekricevi ĝin per tiu Koleghelpa Kaso devas anonci sin ĉiun jaron ekzemple tiel: „Saluton! Mi ŝatus (plu) membriĝi! Bonvolu sendi al mi IPR-n ankoraŭ dum unu jaro! Koran dankon!” (Sendu tian teksteton al ilei.kasisto@gmail.com.) Ĉu tio estas malfacila paŝo? NE! Bv fari kaj vi restos kun ni en la LIGO aŭ venos kun ni en la LIGON!! (Noto: ĉar la kaso ne havas senfinan enhavon, ILEI ne povas garantii al iu ajn akiri membrecon tra tiu kanalo.)

Mireille GROSJEAN, prez de ILEI

NdlR: Nia vic-sekretariino kaj prizorganto de nia membrolisto Magdalena FEIFIČOVÁ verkis por vi helpilon precizan, kies nomo estas¹:

Dekalogo de bona IPR-abonanto

1. **Bonvolu legi vian bultenon**, kiun vi antaŭpagis. Multfoje vi trovos respondojn al viaj demandoj rekte en ĝi.
2. Viajn demandojn rilate al viaj **aliĝiloj, ŝanĝoj personaj datoj kaj ne-ricevo de Internacia Pedagogia Revuo** bonvolu direkti ne al la tuta mondo kaj ĉielo, sed rekte kaj senpere al ununura retadreso ilei.officejo@gmail.com.

¹ Dekalogo estas aro de dek principoj.

3. Viajn demandojn rilate al **pagoj** volonte traktos kaj respondos nia kasisto William HARRIS (Vilĉjo) en sia retadreso *ilei.kasisto@gmail.com*.
4. Viajn **artikolojn** ege volonte akceptos kaj plutraktos nia redaktoro József NÉMETH (Jozefo) en sia retadreso *jozefo.nemeth@gmail.com*.
5. Bonvolu konsideri, ke **la estrarajn laborojn faras la koncernuloj volontule**, ne kontraŭpage. Same konsciiĝu, ke ili ofte ne havas nur devojn rilate al siaj ILEI-funkcioj, sed plej ofte volontulas ankaŭ alikampe, kaj eĉ havas laborejajn aŭ familiajn devojn kaj bezonojn. Tial **bonvolu doni al ili iom da tempo** por reagi al via demando.
6. Bonvolu konscii, ke **informoj pri viaj pagoj** venas flanke de UEA kaj aliaj bankaj institucioj ne tuj, sed iom daŭras. Tial ankaŭ iom daŭros, ĝis via revuo estos al vi liverita.
7. **Paperajn IPR-ojn liveras** la belga FEL, al kiu mi sendas la adres-slipojn, la **retajn liveras** nia vicprezidantino Zsófia KÓRÓDY, al kiu same mi liveras la retadresojn. Do, ĉiujn **problemojn pri ne-ricevo de la bultenoj bv. sendi al la oficeja retadreso**, ĉar plej verŝajne mi plej bone scios, kio okazis.
8. **Mi vere ŝatus, se mi havus la mendojn kaj monon antaŭ la eldono de la unua numero en la koncerna jaro. Kelkaj faras tiel kaj al ili mi el profundo de mia koro sincere dankas.**
La restantajn mi petas zorgi pri tio, ke la mendoj kaj la pagoj atingu min kaj nian kasiston Vilĉjo ĝis la fino de marto, kio estas momente oficiala limdato por pagoj.
9. Por **ne ŝarĝi** FEL-anojn, kiel distribuantojn de paperaj IPR-oj, mi ŝatus, se vi konsentus kun tio, ke **postsendado de paperaj IPR-oj** al novmendintoj okazu kune kun la liverado de la aktuale sendenda numero. Mi esperas per tio forigi plusan laboron al FEL-anoj, kiuj zorgas ne nur pri nia bulteno, sed ankaŭ pri kaoso en nia membrolisto. Mi estos ega danka al vi ĉiuj pro tio. **Postsendadon de retaj IPR-oj** mi mem povus prizorgi tuj kiam mi ricevos konfirmon pri via pago flanke de nia kasisto.
10. Se vi **havas iajn rimarkojn pri nia laboro**, bv. ne trakti ilin kun viaj geamikoj, sed ni ĉiuj volonte aŭdos (pli bone - retlegos) ilin kaj klopodos solvi kion ni povos. Ĉi-loke mi ŝatus publike **pardonpeti pro la turbuloj** kiujn mi, kiel novulino en la estraro, ĝis nun faris;

mi iom post iom klopodos forigi la malglataĵojn kaj plibonigi mian laboron. Samtempe **ni deziras al vi ĉiuj agrablan legadon de via – nia organo IPR – Internacia Pedagogia Revuo.**

Fejfi, vicsekretario de ILEI

Por via notlibro

Enprofundiĝi en literaturon, historion kaj movadon de Esperanto, konatiĝi kun ĝia lingvistika priskribo, akiri larĝan bildon pri planlingvoj kaj interkultura komunikado.

Interlingvistikaj Studoj en Poznano, Pollando

Aliĝu baldaŭ por la nova starto en septembro 2014!



Jen la konstanta propono de la **Interlingvistikaj Studoj de la pola Universitato Adam Mickiewicz**, en Poznano. Enkadre de la specialiĝo – okazas ankaŭ **instruista trejnado** kunlabore kun ILEI kaj *Edukado.net*. La tri-jara postdiploma studado formas interlingvistojn, esperantologojn kaj instruistojn kun firma kaj larĝa teoria bazo kaj utilaj praktikaj konoj.

Surloke en Poznano okazas **unusemajnaj intensaj sesioj** dufoje jare (septembre kaj februare), interese oni laboros hejme uzante ankaŭ la retajn eblojn. La

spertoj de la pasintaj 15 jaroj montras, ke la internacia etoso helpas la komunan studadon sendepende de aĝo kaj profesio. E-o transpontas inter diversaj kulturoj kaj lingvoj kaj aperas en sia natura kunteksto. Partoprenis jam gestudentoj el dudeko da landoj de Kroatio kaj Makedonio tra Hungario, Svisio, Rusio ĝis Brazilo kaj Japanio.

Konataj fakuloj gvidas la lernemulojn tra tiu interesa malkovra vojo: Věra BARANDOVSKÁ-FRANK, Tomasz CHMIELIK, István ERTL, Zbigniew GALOR, Aleksander KORJENKOV, Katalin KOVÁTS, Humphrey TONKIN, John WELLS. Eblas partopreni en esperantologia metiejo, kiu spronas la gestudentojn al krea laboro. Vizitu la retejon de la Studoj, kie troviĝas studplano, raportoj pri antaŭaj sesioj kun fotoj, ĝisnunaj kontribuantoj kaj eblas kontaktiĝi kun la nunaj gestudentoj.

Post plenumo de hejmtaskoj kaj ekzamenoj dum la 3-jara studado, fina ekzameno kaj defendo de diplomlaboraĵo la partoprenantoj akiras atestilon pri plenumitaj interlingvistikaj studoj de UAM. Tiu ĉi kompleksa formado – komparebla kun filologiaj studoj kaze de aliaj lingvoj – estas unika.

En septembro 2014 startos nova grupo. Kandidatoj el la tuta mondo estas bonvenigataj.

Postuloj: bona kono de E-o (min. nivelo B2) kaj baza kono de E-kulturo, baza diplomo pri superagradaj studoj.

Aliĝdato: 15.08.2014. Jam nun petu aliĝilon!

Studkotizo: A-landoj: 1850 PLN (ĉ. 460 EUR), B-landoj: 700 PLN (ĉ. 175 EUR) / semestro. (ESF kutime disponigas kelkajn stipendiojn.)

*Prof. Ilona KOUTNY, Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj UAM,
interlin@amu.edu.pl, <http://www.amu.edu.pl/~interl/>*

Germanio/AGEI

2xSEP 2014 (Semajno de Esperanta Perfektigo)

Intensaj lingvokursoj kun faka kaj metodika trejnado



19.07-03.08.2014 en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo

Studado laŭ modula sistemo (MITE). Du sin-sekvaj semajnoj (eblas ankaŭ parttempa partopreno): lernado en intensa formo, traktado de la fakoj de la unujara ILEI-klerigprogramo: gramatiko, interlingvistiko, literaturo, historio, lingvopedagogio, metodiko, Esperanto-kulturo.

Aldoniĝas temoj pri movada informado, organizado, varbado, gazetara laboro, interkultura komunikado.

Distra programo: ekskursoj, geo-kaŝado, migrado en la plej belaj lokoj de la Harz-montaro kaj Nacia Parko Harz, vizito al Hannover, Göttingen, Goslar (UNESKO-mondheredaĵo), muziko, filmoj, kantado, dancado.

Stipendio, rabato por 10 partoprenantoj. Certigu vian lokon per frua aliĝo ĝis 28.02.2014. **Kontakto:** *Germana E-Centro (GEA-klerigejo) Peter ZILVAR, DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6. esperanto-zentrum@web.de*

Zsófia KÓRÓDY, ILEI-vicprezidanto

Sen lernolibro – ĉu vere preferinde?²



Esenca trajto de la Cseh-metodo estas la fakto, ke la kursanoj ne sekvas lernolibron. CSEH komencis instrui tiamaniere pro nura hazardo. Kiam li ricevis inviton instrui en Transilvanio mallonge post la Unua Mondmilito, lernolibroj estis tutsimple neaĉeteblaj. Tial li devis improvizi: li prezentis sin en Esperanto kaj invitis la lernantojn fari same, tiam li komencis indiki objektojn kaj diri iliajn nomojn en E-o.

Tiel naskiĝis la sistemo, kiun ni nun nomas la Cseh-metodo. Ĝi estis tiel sukcesa, verŝajne pro la personeco de CSEH mem, ke li neniam poste uzis lernolibron, sed ĉiam instruis nur per rekta metodo.

Por normala instruisto, al kiu eventuale mankas la brila personeco de CSEH, la manko de lernolibro portas plurajn malavantaĝojn.

1. La instruisto devas mem decidi, kiel prezenti ĉiun novan eron de la kurso: do praktike mem krei la tutan kursomaterialon.
2. La tuta leciono centriĝas ĉirkaŭ la instruisto, kiu restas ĉiam sursceneje, direktante, prezentante, aktorante, demandante, instigante, inspirante.
3. Se la instruisto volas prezenti liston, ekz. la nombrovortojn, la kolorojn, la monatojn, la tagojn de la semajno, ŝi/li devas skribi ĝin sur la tabulon, kaj poste atendi, dum ĉiuj kopias ĝin. Tio estas perdo de tempo kaj kunportas riskon, ke ne ĉiuj lernantoj transskribos senerare. (Kontraŭ tio eblas argumenti, ke dum la lernantoj pene kopias ekzemple la liston de la monatoj, ili samtempe komencas lerni tiujn vortojn.)
4. La lernantoj notas ĉiujn skribajn ekzemplojn en siajn kajerojn, sed finfine ne havas sisteman prezenton de la materialo. Se ili volas retrovi ion, ili devas trafolumi sian kajeron, en kiu la materialo aperas sen indekso kaj sen aparta ordo.

² Prelego en Tago de la Lernejo en la 98a Universala Kongreso de Esperanto, Rejkjaviko, Islando, 2013

5. Se lernanto maltrafas lecionon, ŝi/li ne povas hejme legi la perditan materialon.

6. Pro la neceso ilustru ĉion mem, Cseh-instruistoj kutime trenas al la leciono amason da malgrandaj objektoj, kiuj utilas por ilustru la instruatan materialon.

7. Mankas ekzercoj por pli profunde trakti malfacilaĵojn, ekz. la akuzativon.

8. Ĉio estas prezentata per mallongaj frazoj. Mankas pli longaj legotekstoj.

Ĉiu medalo du flankojn posedas, kaj tiuj malavantaĝoj foje povas ankaŭ esti avantaĝoj. Tradiciaj lecionoj, en kiuj oni simple sekvas la tekstojn kaj ekzercojn en lernolibro, povas esti tede rutinaj. Per la Cseh-metodo, aliflanke, la horo de la leciono estas horo aktive spertata de la kursanoj, plena je surprizoj (ĉar ili ne povas antaŭvidi, kio sekvos), en kiu ili ne pasive ensorbas la materialon, sed konstante partoprenas.

Jam de la komenco aliaj instruistoj, kiuj volis instrui laŭ la sistemo de CSEH, sentis la bezonon pri lernolibro kaj legomaterialoj. En 1929 ili konvinkis lin eldoni sian kurson kiel gvidlibron por instruistoj. CSEH mem ĉiam insistis, ke tiu libro estas nur modelo, kaj ke la instruisto ne sklave sekvu ĝin, sed mem adaptu la materialon laŭbezone. En 1931 aperis ok legolibretoj kun la titolo *Konversacia literaturo*, kiu enhavis interalie plurajn kontribuojn de BAGHY. Kvankam la humuro kaj la ilustraĵoj fariĝis pli kaj pli eksdataj, tiuj libretoj estis reeldonitaj ĝis la fino de la sesdekaj jaroj.

Mi mem sekvis Cseh-seminaron gvidatan de Atilio ORELLANA ROJAS kaj la modelajn lecionojn de Graĵina OPULSKIENĖ dum la UK en Zagrebo en 2001. Tuj poste, mi komencis mem instrui laŭ la Cseh-metodo ĉe la Esperanto-grupo en Romo. Dum la seminario ĉe la UK, mi aĉetis la libron *Baza Cseh-kurso*, kiu malgraŭ kelkaj korektoj kaj modifetoj esence estas la kurslibro de CSEH eldonita en 1929. Mi tuj konstatis, ke kvankam tiu libro enhavas utilajn ideojn por instruisto, ĝi apenaŭ utilas por moderna kurso. Kiel ĉiuj Cseh-instruistoj, mi estis devigata tre zorge antaŭpretigi ĉiun lecionon, prenante ideojn el la libro, sed mem kreante mian materialon. Tio kompreneble estis tre temporaba afero, precipe dum mia unua jaro de instruado.

Dum postaj jaroj, mi komencis produkti pli kaj pli da materialo por akompani mian kurson. Mi mem faris kaj fotokopiis foliojn por disdoni al la lernantoj: koloroj, nombrovortoj, semajntagoj kaj monatoj, horloĝo kaj horoj, la familio, la korpo, vestoj, tabelo de la korelativoj, verbofinajoj, la akuzativo, sufiksoj ktp. (Multaj folioj estis amatore ilustritaj de mi mem, aŭ foje mi tondis ilustraĵojn el revuoj kaj simile.) Krome mi mem kreis ekzercojn kaj demandarojn, aŭ serĉis kaj fotokopiis ekzercojn el *edukado.net*. Jen tipa agado de Cseh-instruisto, necesa pro la manko de lernolibro por la kursanoj.

Kelkajn modifojn mi faris: precipe mi neniam uzas la sistemon de ĥora respondado, kiu estis tre ŝatata de CSEH. Li instruis dekojn aŭ foje eĉ centojn da homoj samtempe, do ne estis eblo pri unuopa respondado. Bedaŭrinde, en la roma grupo neniam ĉeestas tiom da lernantoj, do nenio malhelpas individuan demandadon kaj respondadon. Tio ebligas pli personan kaj interesan demandadon, ekz. „Kie vi loĝas?“, „Kiam estas via naskiĝtago?“, „Ĉu vi preferas vinon aŭ bieron?“, „Ĉu vi manĝas viandon?“, „Kiel vi venas al la Esperanto-kurso?“ (ekz. aŭtobuse, piede ktp.), „Kiujn lingvojn vi parolas?“, „Kiun ĵurnalon vi legas?“, „Kion vi faris hieraŭ vespere?“, „Kiun filmon vi ŝatas?“, „Kien vi iros ĉi-somere?“ Foje mi instigas la lernantojn paroli unu pri la alia, ekz. „Kia estas la ĉemizo de Carla?“, „Kiaj estas la okuloj de Giorgio?“, „Kiu inter ni estas la plej alta?“ Tiaj demandoj estas tre ŝatataj de la lernantoj, ĉar ili parolas pri si mem kaj pri la aliaj homoj en la ĉambro. Tio evidente estas pli interesa kaj amuza ol demandoj pri la aventuroj de inventitaj roluloj en lernolibro.

Kiam aperis la libro de Stano MARČEK *Esperanto per rekta metodo*, mi konstatis, ke tio estas perfekta akompanaĵo al la Cseh-kurso. Ĝi sekvas pli-malpli la saman modelon, sed male ol la tradicia Cseh-kurso ĝi enhavas ekzercojn kaj pli longajn legaĵojn. Krome, ĝi estas ilustrita, tiel ke la kompatinda instruisto ne plu estas devigata kuntreni sian valizon da grandaj libroj, malgrandaj skatoloj, verdaj pomoj, blankaj musoj ktp.

Aliflanke, mi intertempe sufiĉe enhejmiĝis en la Cseh-metodo por ne deziri labori rekte de la lernolibro. Anstataŭe mi prezentas la novan materialon per la tradicia metodo de demandado kaj respondado, kaj nur fine de la leciono rapide tralegas kun la kursanoj la koncernenan ĉapitron de la libro. Tiel la kursanoj ripetas kaj firmigas la ĵus lernitan materialon, kaj se iu maltrafas lecionon, ŝi/li povas legi ĝin hejme. Uzante tiun libron, mi devis

rearanĝi mian propran materialon laŭ la sama sinsekvo; ekzemple, ĉar en la tria ĉapitro aperas la demandovortoj **Kie?** kaj **Kia?** kaj la sufikso **mal-**, mi zorgas prezenti tiujn vortojn per la kutima Cseh-sistemo antaŭ ol legigi la ĉapitron.

Unu gravan ŝanĝon mi faris: En la unua ĉapitro estas prezentita la strukturo **Kio estas tio?** La tradicia Cseh-kurso tamen komenciĝas per **Kiu estas vi?** kaj daŭrigas per demandoj pri la profesioj de la ĉeestantoj. *Esperanto per rekta metodo* atingas demandojn kun **Kiu?** nur en la tria ĉapitro. Laŭ mi estas tre grave komenci per la kursanoj mem, ne per demandoj pri objektoj en la ĉambro. Tial mi restas ĉe la modelo de CSEH, komencante per la frazoj „*Mi estas Anna. Kiu estas vi?*” Tiel la kursanoj tuj prezentas sin, kaj poste mi invitas ilin diri ankaŭ sian profesion.

Antaŭ du jaroj nia grupo akiris projekciilon, kaj mi lernis fari prezentaĵojn per *PowerPoint*. Tiel malfermiĝis nova ĉapitro en mia E-instruado. Mi nun pretigas bildmaterialon, kiun mi uzas por prezenti la vortojn kaj strukturojn en la libro *Esperanto per rekta metodo*. Tio ne signifas, ke mi forlasis la Cseh-metodon, ĉar la bildoj kaj tekstoj estas traktataj per la tradicia sistemo de demandado kaj respondado. Post prezento de la lernomaterialo, ni kune rapide tralegas la ĉapitron en la lernolibro.

Tiu bildmaterialo ankoraŭ ne estas preta por transdono al aliaj instruistoj, sed dum la lernojaro 2013-14 mi planas plibonigi la prezentaĵojn, tiel ke mi espereble povos dum la daŭro de la jaro iom post iom disponigi ilin al aliaj instruistoj pere de *edukado.net*.

Anna LÖWENSTEIN (Italia), <anna.lowenstein@esperanto.org>

Graveco de tuja lingva praktiko post E-kursoj



Estas granda laboro de instruistoj, kiuj sukcesas interesi iom da personoj kaj poste gvidi bazan E-kurson. Tamen grandega plimulto de tiuj kursoj neniam estas ligitaj al iu praktikado de la kursanoj en internacia E-aranĝo, kiel la nura natura ĉirkaŭaĵo por uzi E-on. El tiaj kursoj ege malofte iu vere esperantistiĝas, eĉ se tiu

sufiĉe bone lernis E-on. Pro tio gravegus por gejunuloj, kiuj sukcesas finfari elementan kurson, iri al iu internacia junulara aranĝo. La plej bona nuntempe en Eŭropo estas SES (Somera E-Studado) en Slovakio, kiu ankaŭ ne multe kostas. La instruistoj devus stimuli la kursanojn iri post la kurso tien. Ofte ili timas solaj iri al iu tia aranĝo kaj la instruisto – se li/ŝi vere volas, ke lia/ŝia laboro ne estu vana – organizu tian vojaĝon tiel, ke kunvojaĝos kun la novlernantoj iu sperta esperantisto aŭ la instruisto mem.

Mi vidis, ke miaj gelernantoj en Maribor venadis tri jarojn al miaj kursoj pro mi (verŝajne miaj kursoj estis por ili amuzaj) sed ne fakte kaptiĝis de la Movado. Sed pasintjare unu el ili iris kun mi al SES kaj nun estas arda agantino kaj aktivulino. Tiu restado komplete ŝin ŝanĝis. Sen tia praktika apliko kaj konvinkiĝo, ke Esperanto vere portas novajn amikojn kaj komprenojn, ne eblas krei seriozajn movadanojn. Tial ĉiu kurso sen tio, ke post ĝi iu vere irus al internacia E-aranĝo, estas por la estonto de la Movado neefika maniero agi.

Zlatko TIŠLJAR (Slovenio) <ztisljar@gmail.com>

Erarologio aŭ infektaj malsanoj en nia lingvouzo (II.³)

La Konferencaj frazoj:

- 1) Miaj publikaĵoj estas ne seneraraj.
- 2) Kaj kurioze ĉiam la unu malbono magnetas la alian.
- 3) En tiela ĥaoso rezultas la diferenco inter nacia kaj internacia lingvo.
- 4) La pluralo incitas selekti exemplon de '(zonne)bril' kaj okulvitro/sunvitro.
- 5) Kie estas mia okulvitro? Ĉu mi estas ĝin forgesinta?
- 6) Mi aĉetis tamen tri okulvitrojn por studi la statutojn de UEA?
- 7) Kiel kasisto ni povu rekomendi S-rinon Marian Xantipon.
- 8) Ĉar ne fidus s-rojn kiel Petron Xantippon, ŝia edzo.
- 9) Ili ĵus festas ilian 50-geedziĝon en ĉiujn imponanta 16jarcenta kastelo Belvedero.
- 10) Por la ILEI konferenco mi devis havigi multe da, kiel glicerizaĵojn, vegetaran biftstekon kaj kolbasojn, limak-fromaĝon ktp, entute unu-kaj-duono kilo potage.

³ La 1-an parton vidu en IPR 2013/3 p.14-21.

11) Dank'al lia aktivecoj, kun kiu prof.dr. Bonavol priplugis pri multaj kampojn, kiel konsciigon, klerigon, komunumon kaj kunordigon, li esas exempligata al ĉiuj novaj komitatanoj D.

12) En mondo veis novan senton Tra mondon iras forta foko.

13) Misperparolo ĉagrenigas surdetulon miskompreni la pozitivan mesaĉon/ misaĝon/malsaĝon??? de filosofo Johano Johanido.

14) Kian vi estiĝis esperantiston? Mi esperantiĝis jam depost 30 jarojn.

15) Mallonge dirite, kiom da erarojn estas malkovrite far vi?

16) Ĉu vi ne inkluzivis la lastan malĝustfrazon? Ne dankon!

17) BV. mem aldoni almenaŭ unu eraron! Pardonon, mi eraris!

RIPAROJ (*sed komentoj bonvenas*)

1) Konferencanoj tuj vidis, ke NE apartenas al la predikato, do antaŭu ĝin: 'ne estas seneraraj'. Aliokaze necesus kunsribi 'neseneraraj'.

2) LA superfluas en la esprimo 'unu alian/unu je alia' (ni uzu JE nur malofte aŭ teorie). Ĉi-kuntekste. 'magneti' dubigas iujn, tamen samkiel iuj metaloj povas transdoni magnetecon al aliaj, 'infektaj malsanoj' efikas kontaĝe, propagadante sian malbonon.

3) TIELA estas balasta esprimo, komparebla kun 'kielmaniere': sen pleonasmu ni uzu 'tia' aŭ 'tiel granda' ĥaoso. 'Rezulti en' havas malan sencon ol la uzantoj de ĉi tiu furora nacilingvaĵo imagas: 'rezulti' signifas 'sekvi', do ni diru 'Tia ĥaoso rezultas (sekvas) el la diferenco'; aŭ: 'Tian ĥaason rezultigas la diferenco'; INTER implicas pluralon, do 'nacia kaj internacia lingvoJ'.

4) 'Inciti' estas kolerigi, oni celas 'eksciti', sed ĉi-kuntekste sufiĉas 'igas' (instigas). 'Selekti' pli kaj pli ofte estas uzata ekster la PIVa difino (semojn por kruci diversajn speciojn), tamen pli sekure ni uzu 'elekti'. X, kiel Q, W kaj Y donas grafeman eraron en Esperanto: plej ofte kun jardatoj laŭ romia tradicio MCMLXXIII = 1973: malrekomendinde; do: 'ekzemplon', post kio 'de' odoras francisme: prefere „kiel”. La nun sekvanta nederlanda vorto etimologie kunligiĝas kun „berilo”, evidente iam uzita por vidhelpilo. Ĝia singulara nombro kuntrenas la E-an formon, kiu estu 'okulvitroj/sunvitroj'.

5) Kurioze oni ne lernas de eraroj, sed ripetadas ilin obstine. Do ni korektu al 'miaj okulvitroj'. Sed eĉ pli persiste oni neglektas la pronoman resendon, daŭre pensante – ne internacie, laŭ la devizo de Lanti – sed nacilingve: 'ĝin' estu 'ilin'. Krome la kompleksa verboformo plaĉas nur al tiuj kiuj uzas ilin nacilingve. En E-o prefere 'Ĉu mi ilin forĝesis?' (Pronomon sen akcento ni ne metu frazfine.)

6) Daŭre tenace la nacia pensado efikas eĉ numerale: ne temas pri tri-okululo, sed necesas 'tri paroj da okulvitroj'. Male 'statuto' estas deĉe singulara: 'por studi la statuton'. Iu sprite memorigis pri la studo de Ziko VAN DIJK en la Centra Oficejo, kiu efektive tralaboris ĉiujn statutojn de UEA.

7) 'Ni' povas esti pluralo de modesteco, do ne ŝokas 'Kiel kasisto ni...'. Tamen el la kunteksto, ankaŭ la posta frazo (atentu, ke kunteksto ofte etendiĝas preter la finpunkto de unu frazo!), evidentiĝas, ke la 'kiel-elemento' rilatas la rektan objekton: 'Kiel kasiston'. 'Povu', precipe 'devu' estas stranga pensotordaĵo: ni havas la elekton inter 'povas' kaj 'povus' - la riproĉa tono en la posta frazo pliverŝajnigas ke ni ne tro modestu -: 'ni povas'. Titoloj en E-o ne havas majusklon: do 's-inon' (sen -r- kiel en d-rino). Post titolo kaj aliaj anoncavortoj pri la kategorio (La riveron Rejno, la monton Everesto, la urbon Roterdamo) ni ne uzas la akuzativon; krome nur en fikciaj verkoj ni uzu E-nomojn familiajn. Maria Ksantippe (eventuale Xantippos, laŭ la edza nomo). Tia duonesperantigo nomiĝas 'hibrida'.

8) Mankas la subjekto, kiu post 'ĉar' ja estas necesa. 'Ĉar ni ne fidas ...' 'S-rojn' ne funkcias kiel titolo antaŭ nomo, do estu plene skrikbita: 'sinjorojn'. Strikte la apozicio 'ŝia edzo' devus sekvi la akuzativon de „Petron”, sed post ekzemplecita 'kiel' neniam aperu akuzativo: do: 'sinjorojn kiel Petro Ksantippos, ŝia edzo.'

9) 'Ĵus' signifas nur 'antaŭ momento', do nepre havu preteriton kiel predikatan tenseon: 'ĵus ekfestis'; alternative: 'ĝuste nun festas'. Ĉiam ĉe TRIAPERSONA POSESIVO ni konsideru la gramatikan elekton inter lia/ŝia/ĝia/ilia (ties) kaj SIA. Ĉi-kaze evidente „sian". Tamen la esprimo de la jubileo vortiĝis iom kriple: 'kvindekjara geedziĝo'??? Tio ellogus mokan rimarkon: ĉu post duonjarcento ili ankoraŭ ne pariĝis? Hont-evite ni diru: 'geedzecon'. Ne temas pri ajna kastelo, sed nome indikita, do: 'la kastelo Belvedero'. Kiel trakti la epitetojn? Kutime ni distingu la esencan disde la akcesora trajto. La unua antaŭu: 'la deksek<a>jarcenta' (ja ne el kvincent-iom post Kristo) 'kastelo B., imponanta'... Tiu verbo - miasurprize- ne estas transitiva, kontraste kun la sinonima 'impresi': 'imponanta al ĉiuj'.

10) Anglastile oni forgesis la ligan streketon: ILEI-konferenco; 'havigi' estas tia malkompleta esprimo, ke ĝi ne povas stari sola: 'havigi al ni'; ankaŭ 'multe DA' ne malhavu decan substantivon: prepozicio signifas 'antaŭmetaĵo', do nepre kun O-vorto. Sed DA estas tute superflua, nura ŝablonaĵo por memorigi al kursanoj ke post 'multe' tiu prepozicio estas la sole ĝusta. Sed oni ne diras, ke eblas uzi 'multe' sen komplemento. Post ekzemplecita 'kiel' ni jam renkontis la regulon de la 'kazo' nominativo, sed

stranga furora malsano estas aldoni al la elekto la tute superfluan 'ktp', 'k.a.', 'kma'... Se ni ja havus akuzativon post 'kiel' ni konsekvence devus uzi ĝin ankaŭ en la resuma 'entute ... -n'. 'Pli-ol-unu' estas pluralo (ne samopinias André CHERPILLOD, sed la ĝermana „anderthalb/anderhalf” klarigas ke la 'alia=dua prezentiĝas nur duone’: do principe du-minus: sekve kun pluralo): 'unu kaj duona kilogramoj' ('kilo' estas boat/ŝipparto). 'Po' ne respondas al la nacilingva 'per'/'par' k.s., sed enkondukas la interesan, sciindan novan kvantan informon, ĉiufoje/por ĉiu aparta kazo respondantan al certa mezurunuo: veturi po 90 kilometrojn hore; perlabori po 1000 eŭrojn en monato. Do ĝi aperu antaŭ 'unu kaj duona'; kaj por la rutina mezurunuo ni uzu 'en tago' aŭ 'tage' (ĉiutage' estus pleonasma).

11) Tro ofte oni misuzas „Dank' al” anstataŭ 'pro', sed ĉi-kaze ĝi taŭgas (atentu la spacon post la elizio de 'Danko <estu> al': parenteza, intera frazeto, komparebla kun 'paŝo <sekvas> post paŝo'). Pri triapersona posesivo ni jam lernis la lecionon en frazo 9: 'siaj'. La oftega misabstraktaĵo 'aktivecoj' dekomence estis nura paŭsaĵo de nacilingvaj esprimoj: 'activities', 'activités', 'activiteiten': temas pri konkretaj agoj: 'aktivaĵoj' (komparu: amikaĵo). Prepozicioj ĉiam estu uzataj proprasence, do ne nacirutine 'kun', sed 'per kiuj' (rilatas al aktivaĵoJ). Ankaŭ la titoloj ne sekvu naciajn rutinojn: 'prof. d-ro'. Por eviti misakcentadon, ni provizu Bonavol per apostrofo: Bonavol'. 'Pri-' en 'priplugi' ne havas sian signifon kiel prepozicio, sed servas nur por emfazi la transitivecon: post ĝi do ne sekvu 'pri' sed 'multajn kampojn': Ĉu jam via ruĝa krajono fortstrekas 4 akuzativojn post la ekzempla 'kiel'? 'Esas' estas hazarda Ido-ismo. Sekvas 'ekzempligata': la ATA-participo erarigas multajn, kiuj ne komprenas, ke en la prezenco -ata (ne -ita) estas la normala formo de la ago, ĉu longedaŭra aŭ momenta. Sed evidente ĉi tie temas pri kutimo, do kiel ajn - ata estas ja en ordo. Tamen la radiko ekzempl estas substantiva, kaj la rekta verbigo 'ekzempli' signifas 'provizi per ekzemplo(j)'. Tial la faktitiva -ig- estas erariga, ĉar ne temas pri transdono de tasko al iu alia. Fine troviĝas ENHAVA eraro: ne ekzistas 'komitatanoj D'. Plej verŝajnas mislego B>D, tamen necesas kontroli tiajn erarojn ĉe la fonto.

12) Terura galimatio de surdetula aŭdo de la himno: Ja eblas rekonstrui ĝin per rezonado pri la bezono de LA: En LA (= nian, do difinitan) mondon venis nova sento (ne LA sento, ĉar ĝi estas nova kaj la klarigo venos poste), tra la mondo (sen akuzativo, ĉar la celo estas ĉirkaŭirado ĉie ajn en la mondo, ne traboro de la mondo por atingi la ekstermondan spacon); ankaŭ la 'voko' estas nur la portanto de la nedifinita sento. Eblas, ke Zamenhof ja

sentis ian malfortan aliteracion Forta Voko/Foko, se almenaŭ jido samkiel la nederlanda ne ĉiam distingas voĉhavajn kaj senvoĉajn konsonantojn: same en la paralela 'Pacaj Batalantoj'.

13) Ne nur ditografio (balbuta skribo), sed ankaŭ superflua -IG- misprezentas la intencitan 'ĉagrenas'. Krome la infinitivo 'miskompreni' ne bone sidas post 'ĉagreni': miskomprenigante (ne uzu 'ĝis miskompreni, ĉar 'ĝis' plene uzeblas prefikse ĉe verbo; tiel ke li miskomprenas). Eblus: 'malhelpante kompreni'. Voĉlegado evitigas misskribojn de intervokala -s-: ĉu vi rimarkis, ke plej ofte la nacilingva origino de tia -s- estas -ss-? Komparu casus-kazo; cassa-kaso. 'Pozitiva', 'filozofo'. Kaj mankas LA antaŭ la kategorivorto 'filozofo' akompane al la propra nomo, kies esperantigo estas dubinda. Johnson, Johansen/Johansson, Jansen???

14) Ni vidis, ke 'ekesti' kaj 'estiĝi' ne estas kopuloj: 'Kian' povus esti arkaismo (de antaŭ la „Aldono al la Dua Libro”: 'kiam', sed ligo kun la fora 'esperantiston' ni ankaŭ ne povas supozi en tia primitiva lingvaĵo: la nepravigebla akuzativo, nur pro la pozicio frazfine montras rudimentan lingvokonon. 'Kiam vi (far)iĝis esperantisto?' 'Jam antaŭ 30 jaroj' estus la bona respondo; sed klare oni miksis 'mi jam aktivas de antaŭ 30 jaroj' kaj 'depost 1982'.

15) Absolutaj participoj estas antikvaĵo, ofte malfacile laŭgramatikigebla: Se diri mallonge/ Koncizadire/ Malmultvorte/ Vortoŝpare. Post prepozicioj ne aperu rekta objekto: ĝi ankaŭ ne taŭgas en frazo kun la pasiva voĉo de la predikato. Ĉu post 'Kiom', 'multe', 'sufiĉe' kaj 'kelke' ni uzu -e-predikaton? Mi neniam faras tion, kaj PAG rekomendas uzi 'multo', 'Kiom da (= kiukvantaj) eraroj estas malkovritaj (! „silepso” aŭ „enalago” laŭ la stilistiko) de vi ('far' ne havas ajnan klarigan 'plusvaloron', se ne temas pri verboj kiel 'ŝtelita', 'senigita', 'heredita' k.s.)

16) Nur aĵoj, grupo povas inkluzivi enhaverojn. do: 'inkluzivigis' / 'inkludigis' (en la kalkulon); Ni evitu adjektivan kunmeton kun substantivo: 'malĝustan frazon'.

Ne, dankon! (la komo ofte estas esenca indiko de parolritmo: laŭ la greka origino ĝi signifas 'forhako').

17) BV spegulas nederlandan mallongigon, neniel imitindan en Esperanto: 'Bv' = Bonvolu (ne sekvu volitivo, ĉar 'voli' estas malkompleta (moda) helpverbo, postulanta la infinitivon, kiel 'povi' kaj 'devi'. Antaŭ numeralo ni uzu 'minimume' anstataŭ 'almenaŭ', kiu povus ligiĝi al 'eraro', kun alia frazakcento.

Mi daŭre kolektas erarojn: feliĉe Esperanto estas vivanta lingvo kaj abunde liveras eĉ nedigesteblajn fruktojn, kiujn mi tamen ofte admiras.
(*fino*)

Rob MOERBEEK (Nederlando), <moerbeekr@gmail.com>

Angla lingvo perfortas ĉinajn lernantojn (II.⁴)

在第46 届ILEI 国际大会上的报告 (2013-7-15, 德国)

Prelego en La 46a ILEI- Konferenco (2013-07-15, Germanio)

V. Mirinda elspezo por la angla lingvo

Kiom elspezis la angla lernigo en Ĉinio? En 2012 la ĉina centra registaro elspezis 62 miliardojn da dolaroj por edukado. La eduka celo estas lernigi sciojn al lernantoj. La angla lingvo lernigita al lernantoj estas pli ol 10%, se ni mezuras la tuton de ĉiuj lernigitaj scioj je 100. Do la elspezo por la angla lingvo atingas 6,2 miliardojn da dolaroj.

En 2011 en Ĉinio estis 180 milionoj da lernantoj, el kiuj 150 milionoj estis lernantoj de elementaj kaj mezlernejoj, 25 milionoj estis studentoj de universitatoj. Ĉiu lernanto pokape elspezis 16,26 US\$ por lernado de la angla lingvo, la sumo de la tuta lando atingis 3 miliardojn da dolaroj. La mono estis pagita de la familioj de la lernantoj.

Do la sumoj por la angla lingvo el la registaro kaj familioj estis 9,1 miliardoj da dolaroj. La sumoj superis la armean elspezon de Tajvano (9,08 miliardoj US\$), kiu laŭvice troviĝis en la 22a loko en la mondo. Laŭ retaj informoj, partoprenantoj en ekzameno de (IALTS) *Internacia Angla-Lingva Testa Sistemo* estas ĉ. 300 mil ĉiujare en Ĉinio. La kotizo pokape estas 268 US\$. La ekzamenatoj pokape elspezas fakte pli ol 488 US\$ inkluzive aliajn pagojn, sume 146 milionojn da US\$.

Aŭguste 2009, s-ro Ma Yuongtae, membro de la *Akademio de Esperanto*, profesoro de korea universitato, alveninte al Harbino en Ĉinio plendis, ke la angla lingvo detruis ne malmultajn arbarojn pro uzo de libraj paperoj en aziaj landoj. La valoro de la detruitaj arbaroj estas pli granda ol la monaj elspezoj por la lernado. Mi subtenas lian vidpunkton.

⁴ La 1-an parton vidu en IPR 2013/3 p. 25-28.

VI. Fiasko de la „Angla-Lingva Urbo” en Pekino

La 14an de decembro 2011, s-ro Wang Haichen, estro de Miyun Gubernio en Pekino, raportis ke la registaro planas konstrui „Anglan-Lingvan Urbon” en la regiono. Laŭ lia raporto, ĉiuj vizitantoj de la urbo bezonos peti specialajn „pasportojn” kun permesaj stampoj. Ĉiuj ĉinoj kaj urbanoj, kiuj dezirus eniri en la urbon, ne rajtus paroli en la ĉina lingvo. En la sekva tago post la publikigo de la projekto, tuj aperis dek mil diversaj kontraŭaj voĉoj el diversaj ĵurnaloj kaj retejoj. Oni eĉ telefone kontaktis la registaron por esprimi kontraŭajn vidpunktojn. La 16an de decembro mi vidis ke iuj informoj pri la projekto en retejoj estis nuligitaj de „nigra reta gasto”. La 19an de decembro proparolanto de la gubernia registaro deklaris nuligon de la projekto laŭ proponoj de popolanoj. La projekto estis pinta ago perforti ĉinajn popolanojn. Por kontraŭi la projekton, multaj ĉinoj menciis historian eventon: ĝis antaŭ cent jaroj ne malmultaj landoj regis Ĉinion. Oni permesis nur al fremdlandanoj eniri en konatan ĝardenon en Ŝanghajo. Ili starigis ĉe la ĝardeno pordo tabulon kun afiŝo „Ĉinoj kaj hundoj ne eniru!”. Por kontraŭi la projekton pri la angla-lingva urbo, oni moke proponis al la gubernio, ke ili starigu similan afiŝan tabulon antaŭ la urbo: „Parolantoj de la ĉina lingvo kaj hundoj ne eniru”. Ŝajnas, ke la mokinda mallongviva „Angla-Lingva Urbo” atentigis nenium en la eduka ministerio. Kiom da jaroj daŭros la perforto de la angla lingvo en Ĉinio, mi ne scias! Tion decidus la eduka ministerio.

VII. La Nobelpremio mokis la edukan sistemon

Je la 19a horo en la 11a de oktobro 2012 laŭ la pekina tempo la Sveda Akademio pri Literaturo deklaris doni la Nobelpremion de Literaturo 2012 al la ĉina verkisto s-ro Mo Yan. S-ro Mo Yan estas la unua verkisto de ĉina deveno, akirinta la premion. Personoj de la ĉinaj literaturaj rondoj opiniis, ke premii s-ron Mo Yan estis jeso de la mondo al la ĉina literaturo, kaj estos progresigo kaj evoluigo de la ĉina literaturo. Antaŭ li neniu loĝanto en Ĉinio ricevis la premion. La tuta lando estis honorigita pro la premio. Lia premio ĝojigis multajn ĉinajn popolanojn, inkluzive kompreneble edukajn ministrojn, kiuj tamen ne rimarkis, ke la premio estas forta vangofrapo al ili. Ĉar s-ro Mo Yan diplomiĝis nur en elementa lernejo, kie ne estis angla lingvoinstruado dum lia lernado. Post diplomiĝo en elementa lernejo li ne vizitis mezlernejon. Se mi estus eduka ministro, mi tuj sentus grandan honton post tujaj ĝojo kaj emocio je aŭdo de la premio.

Ni ĉinoj devas profunde repensi nian edukan sistemon. La sola ĉina Nobel-premiito, s-ro Mo Yan, eĉ ne estis instruita en la nomata bela kaj bona eduka sistemo. Li estis lerninta nur en elementa lernejo! Li naskiĝis en la jaro 1955 kiam Ĉinio ankoraŭ ne lanĉis la edukan sistemon pri la angla lingvo. Eble iuj bedaŭras, ke li ne scipovas la anglan lingvon. Sed laŭ mi, li devas danki, ke li ne estas perfortita de la angla lingvo, se li dezirus diri kelkajn dankajn vortojn. Se li vivus kaj lernus en la nuna eduka sistemo, li devus elspezi sufiĉan tempon por trapasi ekzamenon pri la angla lingvo kaj li ne havus sufiĉan tempon kaj energion studi literaturon. Male, senkonsidere pri la premio, li eĉ ne ricevus sufiĉan panon.

VIII. Ĉinio vere bezonas la anglan lingvon kaj talentulojn pri la angla

Ĉinio vere bezonas la anglan lingvon kaj talentulojn pri la lingvo. Ĉinio bezonas elstarajn diplomitojn de anglaj fakultatoj, sed ne tutlandajn amasajn anglalingvajn lernantojn, el kiuj nur kelkaj ĉinstile balbutas la anglan, kaj el kiuj 99% ne scipovas, ne uzas la lingvon dum la tuta vivo.

La angla lingvo estas ligilo por kontakti kun la tuta mondo. La nivelo devas esti internacia, sed ne ĉinstila. Ne ĉiuj ĉinoj ligos sin kun la lingvo, ne ĉiuj ĉinoj bezonas lerni ĝin. La saĝa kaj ĝusta vojo estas tio, ke oni instruu la lingvon nur al interesiĝantoj el la lernejoj, al malmultaj lernejoj, eduku specialajn elstarulojn pri la angla lingvo, kaj permesu al la lernantoj libere elekti lerntaskojn vere utilajn kaj interesajn por ili. La eduka ministerio devas eduki talentulojn pri la angla lingvo laŭ tri metodoj:

A) Eduki pintajn anglajn lingvistojn. La eduka ministerio lanĉu projekton por eduki pintajn interpretistojn/tradukistojn. Fondu lingvajn interesajn kursojn en elementaj kaj mezlernejoj, en kiuj povus partopreni interesataj lernantoj. Sendu lingvajn kursanojn kaj la interesatojn al anglaj fakultatoj de universitatoj kaj poste al Usono kaj Britio, por ke ili perfekte posedu la lingvon. Tiel, ĉiuj lernantoj de la angla bonege ellernos la lingvon, bone servos al la lando dum la tuta vivo.

B) Eduki elstarajn fremdlingvajn lernantojn. La registaro fondu malmultajn dulingvajn lernejojn, petu elementajn kaj mezajn lernejojn libere fondi lingvajn kursojn por fremdlingvaj interesatoj. Ĉiuj lernantoj rajtu mem elekti fremdajn lingvojn kaj aliajn lerntaskojn. Se tiel, ni bezonus nur malmultajn fremdlingvajn instruistojn. La lernejoj povus elekti la plej elstarajn lingvajn instruistojn, eĉ dungi fremdlandajn instruistojn.

C) Eduki amatorajn lingvajn interesatojn. Tiuj kiuj ne eniris en lingvajn lernejojn aŭ lingvajn kursojn, povus ŝanĝi siajn lernejojn kaj kurson kiam ili

ekinteresiĝas pri fremdaj lingvoj. Ili ankaŭ povu lerni lingvojn en specialaj kursoj kaj lernejoj. Laŭ la tri proponoj, Ĉinio havos sufiĉajn fremdlingvajn lernantojn. Ĉiuj interesatoj pri lingvoj ricevos altnivelajn lernigojn, kaj multaj nefremdlingvaj lernantoj havos sufiĉan tempon por lerni sian fakon. Tio estas granda ŝparo koncerne instruistojn, financojn kaj lernejan tempon de ĉiuj junaj lernantoj.

IX. Anstataŭigu la sistemon „3+X” per „2+X”

Ĉinio organizas eniran ekzamenon al altlernejoj en junio ĉiujare. La lernantoj de mezlernejoj kiuj deziras eniri en altlernejojn devas sukcese trapasi la eniran ekzamenon por „3+X” fakoj. „3+X” signifas ke el la ekzamenaj 3 estas devigaj kaj 1 estas elektebla fako, nome la ĉina lingvo, matematiko, la angla lingvo kaj unu el aliaj 6 fakoj: politiko, fiziko, kemio, biologio, historio kaj geografio. Nuntempe multaj famaj edukaj fakuloj proponas reformi la sistemon „3+X” kaj praktiki novan sistemon „2+X” por forigi la anglan lingvon el la devigaj fakoj. S-ro Wang Xinglu, komitatano de Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, jam trifoje proponis, ke la eduka ministerio nuligu la angla-lingvan ekzamenon kaj permesu al la lernantoj libere elekti ekzamenajn lingvojn por eniri en universitatojn. Profesoro Li Yang, konata lingvisto, kreinto de „frenza angla lingvo”, proponas nuligi la anglan lingvan ekzamenon en sia blogo. Jen 6 vidpunktoj:

- 1) La angla instruado en la nuna lernejo preskaŭ senutilas. Ĉar preskaŭ ĉiuj altnivelaj anglalingvaj elstaruloj en Ĉinio ne estas edukitaj de la nunaj lernejoj sub la nuna eduka sistemo.
- 2) Post nuligo de la angla ekzameno, la ĉinaj popolanoj rekiros racian penson pri la angla lingvo, oni ne plu diigos la anglan lingvon, ne necesos instrui la lingvon al ĉiuj ĝardenaj infanoj.
- 3) Post nuligo de la lingva ekzameno, ĉiuj landanoj profunde lernos la ĉinan lingvon, ĉinajn kulturojn, kaj pli multajn utilajn lecionojn, legos multajn librojn.
- 4) Post la nuligo de la anglalingva ekzameno, la lando ŝparos multan monon el presado kaj instruado al ĉiuj lernantoj.
- 5) Post la nuligo de la angla-lingva ekzameno, lernejoj kiuj deziras instrui la anglan lingvon, altnivele bonege instruos. Kaj interesatoj pri lingvo profunde lernos ĝin.

Mi kredas ke 90% el la ĉinoj subtenas la vidpunktojn. La ĉina ŝtata prezidanto intervidiĝas kun diverslandaj gravaj homoj ĉiusemajne. Li vere

bezonas la anglan lingvon. Tamen, se li deinfane devige lernus la lingvon ĝis diplomiĝo en universitato, li certe ne havus sufiĉan tempon por lerni aliajn lecionojn. Kiel li posedus sufiĉajn sciojn por gvidi la landon? Eĉ se li bone lernus la anglan lingvon, kiel li bone interkomunikiĝus kun francoj, germanoj, rusoj, japanoj, koreoj kaj multegaj alilingvaj parolantoj?!

X. Letero al la Prezidanto de Usono

Karaj gekolegoj. Mi scias ke la nuna eduka sistemo ne povas ŝanĝiĝi en mallonga tempo. Sed mi esperas, ke pli da homoj profunde pensos pri la graveco de la perforto al la junaj generacioj, kaj alvokos la edukan ministerion ŝanĝi la sistemon. Do mi verkis mallongan satiran artikoleon „Letero al la Prezidanto de Usono”, por atentigi multajn homojn koni la gravecon, kaj por moki la stultan edukan sistemon. Mi petas vian pardonon pro la fakto ke mi ne rajtas legigi ĝin, ĉar la Esperanta magazino *Monato* antaŭ nelonge anoncis aperigi ĝin en la venonta numero. Mi deziras prezenti la leteron ĉi tie. En la letero mi proponis al la prezidanto de Usono, ke li akceptu mian proponon, se matene el sonĝo li ekhavis ideon regi Ĉinion. Li bonvole uzu nek pafilojn, nek bombojn, nek armilojn kemiajn kaj nukleajn, kaj uzu nur sian nacian lingvon. Li nur bezonus laŭdi kaj subteni la ĉinan edukan sistemon. Li ne sendu soldatojn sed lingvajn instruistojn, li ne ĵetu multekostajn bombojn sed bombonojn kun anglaj lernolibroj al Ĉinio, li celu ĉiujn junajn generaciojn de infanĝardeno ĝis universitatoj. Mia propono estas preskaŭ senkosta tamen ege efika. Li ne bezonus elspezi multe, sed Ĉinio regota de lia Moŝto elspezus multan monon, energiojn kaj vivojn de junaj generacioj. Liaj usonaj junaj generacioj havus sufiĉan tempon profunde lerni la nacian lingvon, matematikon, fizikon, kemion, biologion, historion, geografion, literaturon, arton kaj diversajn fremdajn lingvojn, dum la ĉinaj ĝejunuloj devige diligente lernus lian lingvon en pli ol 20 jaroj. Post 20 jaroj, li finfine vidus la efikon. Usono fariĝus multe pli fortega. Aperus pli da nobelpremioj kaj diversaj specialistoj el ĝiaj junuloj. Kaj Ĉinio fariĝus malforta. En Ĉinio aperus multaj fuŝaj anglaj balbutantoj kiuj ne bone posedus sciencon, teknikan, ekonomian, literaturan kaj socian sciojn pro tio ke ĉinoj estas okupitaj balbuti lian belan lingvon.

Mi proponis al li ne timi ke la lingva nivelo de ĉinaj lernantoj superus tiujn de usonanoj. Ĉar la anglaj instruistoj en elementaj kaj mezlernejoj fakte ne bone posedas lian lingvon, iliaj gelernantoj ellernos nur ĉinstilajn anglajn lingvojn. Mi proponis, ke li sendu specialan amikeco-premion al la ĉina

eduka ministerio kaj daŭre laŭdu la edukan sistemon. Mi proponis, ke li ne akceptu mian proponon, se li dezirus regi la landon en kelkaj tagoj, ĉar tio bezonas ĉirkaŭ 20 jarojn de infanĝardeno ĝis universitato, eĉ 40 jarojn, aŭ 60 jarojn. Li finfine sukcesus, se li estus pacienca.

Karaj amikoj, se vi havus intereson pri la letero, bonvole legu en venonta numero de *Monato*. Kaj mi petas vin tradukante ĝin en vian nacian lingvon, aperigu ĝin en ĵurnalo aŭ retejo en via lando, tamen menciui ke la letero aperis en la Esperanta magazino *Monato* septembre 2013.

Koran dankon pro via atento. (*fino*)

HUANG Yinbao „Trezoro” (Ĉinio), <trezoro16800@gmail.com>

Konkurso 2014

Kiu liveros al nia redakcejo la plej nekutiman sed belan kaj informriĉan foton de E-aranĝo (kurso, seminario, kunveno, prelego...)? Estos belaj premioj!! Vi ricevos librojn!!

Kutime sur la fotoj oni vidas jenon:

- Grupa foto, kun aŭ starantaj homoj, aŭ sidantaj, aŭ duone duone, kutime kun flago.
- Disdono de diplomoj
- Klasoĉambro kun diligentaj lernantoj

Povus esti io alia... Bonvolu imagi ion novan, amuzan, allogan!

Jam mi iom provis preparante la numeron de IPR 2013/3:

Aperas kongra virino Rachel parolanta ĉe mikrofono (p. 32)

Aperas Heidi Goes en Azio same ĉe mikrofono (p. 35)

Aperas desegnaĵoj kaj subskriboj konferencaj (p. 43)



Aperas plantado de arbo en Hungario (p. 43)

Aperas inaŭguro de memorŝildo en Herzberg, Germanio (p. 44)

Aperas manĝaĵoj en la interkona vespero konferenca (p. 44)

Jen ekzemplo: iu fotis min dum siesto en Herzberg, la saman tagon de mia elektiĝo. Tamen mi

ne memoras, ĉu mi siestis kiel prezidanto aŭ kiel kandidato! Plie mi ne memoras, kiu sendis al mi tiun foton. Mi pardonpetas al la fotisto.

Kiu fotos novan komitaton de via sekcio en naĝejo? ... studgrupon sur arbo? ... lernadon de bestonomoj en bestoĝardeno?... Studgrupon sub arbo, tion ni jam vidis, okazas ne nur en Afriko.

Limdato por liverado de fotoj: la 31a de oktobro 2014.

La plej belaj, amuzaj, nekutimaj aperos en la numero de IPR 2014/4.

La redakta grupo tre antaŭĝojas vidi viajn artaĵojn!!

Mireille GROSJEAN, prez de ILEI

El la landoj kaj sekcioj

Ĉeĥio

Enkastela E-lernado

Ekplaĉis al mi dormi en kastelo, kaj tial mi ankaŭ ĉi-jare partoprenis la Internacian E-Lernejon, kiu okazis jam la duan fojon en Bartošovice, la malgranda ĉeĥa vilaĝo, inter la 16-a kaj 20-a de oktobro 2013.

Preskaŭ kvindekda partoprenantoj el Ĉeĥio, Slovakio, Pollando, Hungario kaj eĉ unu turko lernis Esperanton kun Stano MARĈEK laŭ lia rektmetoda libro aŭ pliprofundigadis siajn lingvosciojn sub la gvidado de juna hungarino Zsófia PATAKY. Partoprenis ne nur novaj vizaĝoj, sed multaj pasintjaraj partoprenintoj revenis „al la loko de la ago”.

La solenan malfermon dum la ĉeesto de la lokaj urbestrino kaj lernejestrino (kaj ankaŭ de la panjo de la organizanto Rost'o) ĉe la lumo de kandeloj kaj kun (paperaj) reĝaj kronoj surkape ekigis bazlernejanon kantinte du popolkantojn en senriproĉa Esperanto. Sekvis la bonvenigaj alparoloj de la vilaĝaj reprezentantinoj. Dum aliaj vesperoj ni povis sekvi mallongajn filmojn, ekz. pri SES en Martin, aŭ pri ekzotikaj lokoj – la urbo La Paz aŭ la lago Titikaka. Stanislaw MANDRAK prelegis pri la brazila ĉefurbo Brazilio dum la vendreda „brazila” vespero. Krome ravis nin ne nur du organizantoj aldancante en ritmo de sambo, sed ankaŭ la prezentaĵo de travestiulo (travestity show) same en brazila ritmo kaj kun unu kanto eĉ en Esperanto. Sabatvespere same eksonis tri kantoj en E-o krom aliaj belegaj kantoj fare de la muzikgrupo *Nonproblem*.

Interesa estis vizito de loka malsanulejo por bestoj. En ĝi oni zorgas pri la vunditaj aŭ trovitaj sovaĝaj bestoj, kiuj propraforte ne travivus en la naturo. La plej impona inter ili estis aglo, kiu bone timigis nin, kiam li (li, la reĝo de la aero) ĵetis sin kontraŭ la kradojn de sia kaĝo.

La tuttaga ekskurso havis tri celojn. Unue ĝi gvidis al la urbo Nový Jičín, fama pro sia ĉapelproduktanta fabriko. Diversformajn kapkovrilojn oni povis elprovi en la loka muzeo. La sekva ekskursocelo, la urbeto Štramberk, estas konata pro produktado de spicitaj mielkuketoj en la formo de oreloj. Laŭ la legendo en la 13-a jarcento tataroj dum la sieĝo de la teritorio hakis la orelojn de la loĝantoj kaj sendadis ilin al sia paŝao. El la turo Trúba (Trumpeto) estis bela elrigardo al la urbo. En la vilaĝo Hukvaldy oni en la parko vidis la Vulpinon Akra-orelino, figuron el la fama opero de la loka naskiĝinta fama ĉeĥa komponisto Leoš JANÁČEK.

Ankaŭ tiun ĉi aranĝon retsalutis nia ILEI-prezidantino, kiel fakte la ununura el la informitaj oficialuloj – dankon al ŝi pro tio! Momente vi povas vidi, kiel ni fartis, en la paĝaro <http://verdestacio.wix.com/lernejo>. La organizantoj Paŭlo KAŠČÁK el Verda Stacio kaj lia fidela helpanto Rostjo ĈUBOK jam nun promesas novajn ravojn. Bonvolu veni venontjare kaj mem sperti la bonegan etoson de ĉi familia aranĝo!

Magdaléna FEIFIČOVÁ (Fejfi) (Slovakio)

Germanio

SALO-8 en Herzberg am Harz/Sieber, 12-19.07.2013

La 12-an de julio grupo de sep gejunuloj el Góra/ Pollando, akompanataj de du instruistinoj, Lidia NOWAK kaj Lucyna SOZANSKA, venis al Sieber, urbopoarto de Herzberg, la Esperanto-urbo, por partopreni en SALO (Somera Arbara Lernejo) – jam la 8-a internacia renkontiĝo de gejunuloj el Herzberg kaj ĝia pola partnerurbo Góra.

Dum la tuta semajno la grupo de polaj kaj germanaj 12-18-jaruloj matene kune lernis Esperanton kaj posttagmeze sportumis, vizitis naĝejon, promenis en pitoreska ĉirkaŭaĵo de Sieber, lernis la arton de figursegado, ludis, dancis kaj kantis. En la programo denove troviĝis komuna grimpado al la Granda Bulbo, la plej proksima monto, de kies turo oni povas admiri la neforgeseblan pejzaĝon de Harz-montaro kun sube kuŝantaj vilaĝoj kaj urbetoj. Al ĉiuj plaĉis ankaŭ ekskursoj al Torfhaus, Goslar kaj Göttingen, kie la gejunuloj vizitis interalie unu el la plej grandaj eŭropaj universitataj

bibliotekoj kaj en propraj manoj tenis malnovajn librojn presitajn tuj post la invento de la presarto.

La artan programon de la renkontiĝo – kiel kutime – pliriĉigis eksterlandaj gastoj, ĉi-jare multnombro partoprenantaj en la ILEI-konferenco, kiu okazis samtempe en Sieber. Tiel la partoprenantoj de SALO havis eblon lerni japanan kaligrafion, tradician galegan kanton, ekkoni kutimojn nepalajn kaj kubajn, sed kio pleje gravas, la tutan tempon ili ankaŭ lernis unu de la aliaj, pri aliaj kaj rekte spertis, ke ili povas esprimi Esperante ĉion, pri kio ili volas paroli kun siaj samaĝuloj el alia lando. Dum komunaj manĝoj, dum babilado pri hobiaj, amikoj, ferioj kaj lernejo, kiam ili kune ŝercis kaj ridis, antaŭjuĝoj estis malaperantaj kaj komunaj travivaĵoj kreis bazon por daŭra amikeco. Multaj partoprenantoj de SALO aliĝas denove kaj pli aĝaj venas por helpi dum instruado aŭ nur por renkontiĝi kun amikoj.

Ankaŭ ĉi-jare en multaj okuloj estis larmoj, kiam la buso de la pola grupo ekveturis de la parkejo ĉe *Haus Diana*, kie kune loĝis la gejunuloj, por veturigi ilin hejmen. La vizitantoj deponis en la Herzberga kastelo pentraĵojn de du lokaj pentristinoj el Góra, interalie de Lucyna SOZANSKA, kiu akompanis la grupon. La ekspozicion herzberganoj kaj vizitantoj de la urbo povos admiri ekde septembro kadre de la 20-jara jubileo de ĝemelurba kunlaboro inter Herzberg kaj Góra.

Ewa KUKIELKA

Hungario

Plia kunveno markas la Mondan Tagon de Instruistoj

La hungara ILEI-sekcio speciale okazigis sian aŭtunan renkontiĝon, Pedagogian Tagon, por koincidi kun la Monda Tago de Instruistoj, en la 5a de oktobro. La kunsido aprobis la rezolucion en ILEI, kio jam okazis en Rumanio kaj Pollando, kaj kies teksto estis vaste dissendita en ok lingvoj. Agado kaj renkontiĝoj okazis en almenaŭ seso da aliaj landoj. Al la aranĝo venis nur 25 instruistoj, sed ja el ĉiuj anguloj de Hungario.

Samtempe en Budapeŝto, multaj instruistoj venis simile el ĉiuj landpartoj por protesti antaŭ la Eduka Ministeriejo pri maltrankviligaj evoluoj en la nuna eduka sistemo en Hungario.

Nia Pedagogia Tago okazis en la gimnazio Berzsényi Dániel, kun la gastiginto Márta KOVÁCS kaj sekciestro Jozefo NÉMETH. La unua prezentaĵo temis pri la novaj planoj kaj strukturoj en UEA – estraro kun sub-teamoj, nova Konsilio kma. Centre estis la planoj por Aktivula kaj

Instruista trejnado. Tion prezentis la vicprezidanto de la Asocio, Stefan MACGILL. Lin sekvis verva skajpa prezento de Mirejo GROSJEAN, la prezidanto de ILEI, pri la rolo de instruistoj. Ŝi vokis el Parizo kie ŝi estis pro partopreno en kunsido de la franca E-Instituto. Tuj sekvis el Hago dua perreta prezentaĵo – Katalin KOVÁTS prezentis la novan ludon ‘Risko’ ĉe *edukado.net*, eĉ gvidante defore



vivan konkurson inter ses ĉeestantoj. Entute la partoprenantoj miris kaj laŭdis la sukceson de ambaŭ perretaj prezentaĵoj, pruvante, ke eĉ negrandaj landaj aŭ lokaj renkontiĝoj povas havi internacian karakteron.

Posttagmeze okazis prezentaĵoj de fizike ĉeestantaj personoj: István BUJDOSÓ detalis la fakton, ke la nombro de hungarianoj, kiuj en la ĵusa cenzo deklaris sin konanto de Esperanto (ĉ. 11 mil) kvarobliĝis kompare kun la simila deklaro antaŭ dudek jaroj. Blazio WACHA esploris kelkajn rilatojn inter la nunaj ŝtataj ekzamenoj kaj la instruado de Esperanto. Fine, László VIZI prelegis pri tradukmetodikaj demandoj.

Do, ne amasa renkontiĝo, sed fake bonkvalita kaj aprezita.

[*Surfote: Iván BUJDOSÓ ludas Risko-n*]

Stefan MACGILL, <stefan.macgill@gmail.com>

Indonezio

Intervjuoj kaj kongreso en Indonezio

Dum mia ĉi-jara instruvojaĝo tra Indonezio (marto-aprilo) mi ne nur gvidis enkondukajn lecionojn, sed ankaŭ intervjuiĝis plurfoje. Dum la unua halto, en Makassar, mia gastigantino multe helpis per siaj kontaktoj por ke mi povu intervjuiĝi ĉe lokaj radio-stacioj kaj eĉ unu provinca televido-stacio (*Celebes TV*). Ĉe unu radio-stacio, tiu de la nacia radio, ŝi ne havis kontaktojn, sed ni jam tiom komencis alkitimiĝi al intervjuoj, ke ni simple eniris la konstruaĵon kaj petis intervjuon. Duonhoron da klarigado poste ni pasigis tutan horon ĉe rekta elsendo dum kiu la publiko povis reagi telefone aŭ tekst- aŭ retmesaĝe. Tiu sperto igis min peti ankaŭ en la sekvaj urboj

intervjuojn. Tiel ankaŭ en Ambon mi intervjuiĝis ĉe diversaj radioj kaj gazetoj. Post Orienta Timoro (*vidu IPR 2013/3 p. 34-35*) mi flugis al Yogyakarta, kie mi intervjuiĝis ĉe kvin gazetoj kaj du radiostacioj. En Bandung mi instruis ĉe la loka klubo kaj en Ĝakarta sekvis kongres-preparoj, lecionoj ĉe la nacia radio kaj pluraj radio-intervjuoj. La kulmino estis la unua Indonezia E-Kongreso en Bogor. Krom la evidenta rezulto de interkonatiĝo de e-istoj el diversaj indoneziaj kaj aliaj insuloj kaj landoj, grava atingo estis la (re-)starigo de Indonezia E-Asocio. Rigel Bogar, ĵurnalisto ĉe *Voice of Indonesia*, intervjuis s-ron Pribadi Sutiono, la specialan asistanton de la ĝenerala sekretario de la Ministerio pri Eksteraj Aferoj. Tiu ĉi asertis ke en la trejnado de indoneziaj diplomatoj E-o estos inkluzivigita kadre de la ĉi-jara starigo de lingvocentro, en kiu diplomatoj povos lerni krom la anglan kaj E-on 15 lingvojn de Unuiĝintaj Nacioj kaj ASOAN (Asocio de Sud-Orient-Aziaj Nacioj). Li ankaŭ substrekis ke tio ne estas la unua provo enkonduki E-on en la Ministerion kaj ke E-o jam havas longan historion en Indonezio. Tamen, ĝis nun ne estas konata progreso rilate al ĉi tiu lingvocentro.

Ĉe <https://www.sites.google.com/site/esperantoenindonezio/kongreso> vi povas legi raporton pri la unua Indonezia Esperanto-Kongreso kaj ĉe <https://www.sites.google.com/site/esperantoenindonezio/instruado/marto-aprilo2013> taglibroforman raporton pri la agado en Indonezio.



PS: la fotoj aperintaj en IPR 2013/3 (p. 35) montras min en radio-studio de la universitato kie mi instruis. La grupo de studentoj videblas en la suba foto. Pro iu redakta koboldo ili aperis ĉe la artikolo pri Orienta Timoro. Por kompensi jen plia foto el Indonezio. Ĝi montras la internacian koruson dum la arta vespero de la kongreso.

Por fotoj pri Orienta Timoro vidu p. 32-33.

Heidi GOES (Belgio), <heidi.goes@gmail.com>

Kroatio

La 22an de septembro 2013 dum la tago de la urbo Bjelovar, e-istoj el Kroatio okazigis la unuan Deklamkonkurson de la kroata poezio tradukita al E-o. Organizis ĝin UPE, Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto, kune kun siaj gastigantoj E-societo bjelovara kaj DEC (Dokumenta E-Centro) el Đurđevac.



Partoprenis ĝin pli ol dudek gelernantoj el diversaj partoj de Kroatio kun siaj instruistoj kaj pli ol 60 plenkreskuloj kiuj aŭskultis la programon. Gelernantoj venis el 4 elementaj lernejoj, el Zagrebo, Zaprešić kaj la insulo Rab, kaj el unu gimnazio en Đurđevac. Salutis nin la urbestro kiu parolis favore al E-o kaj liaj vortoj, ke E-o pliriĉigas la bjelovaran kulturon, sonoris tra la salono fiere. La publiko ricevis voĉdonilojn kaj ĉiu voĉdonis por sia favorato. Dum la trarigardo kaj nombrado de la voĉdoniloj, la gastoj kaj gelernantoj rigardis ekspozicion de la koreia pentristo-e-isto Ho Song.

Post la tagmanĝo, la komisiono proklamis la ĉampionon kaj disdonis pokalon por la unua loko kaj medalojn por la dua kaj tria lokoj. Ĉiuj partoprenantoj ricevis diplomojn kaj la libron de Tibor Sekelj „Padma, la eta dancistino”, eldonitan de DEC. La E-an programon finis la koruso de gelernantoj el la elementa lernejo Davorina Trstenjaka en Zagrebo kiuj, kun sia instruistino, kantis E-lingve: „Kiam estas vi kontenta” kaj popolan

kroatan kanton „Bela estas Zagorje la Verda”. Tiu sukcesoplena ekskurso finiĝis vespere, kiam la tuta grupo revenis per trajno al Zagrebo.

Marija JERKOVIĆ (Kroatio), <mjerkovic@net.hr>

Nederlando

La estraro de Internacia Esperanto-Instituto decidis denove organizi Cseh-seminaron. Tio estas kurso destinita por personoj, kiuj volas mem instrui laŭ la Cseh-metodo aŭ nur konatiĝi kun ĝi. La partoprenantoj devas bone regi E-on, ĉar la seminario ne taŭgas por lingvo-komencantoj. Ankaŭ e-istoj ekster Nederlando estas bonvenaj.

Jam anoncis sin samideanoj el Germanio kaj Polio. La instruistino estos Katalin KOVÁTS, tre sperta Cseh-instruistino, kiu dum pluraj jaroj gvidis en diversaj landoj Cseh-kursojn.

La seminario okazos en *Riouwstraat 172*, la oficejo de IEI, dum 3 tagoj: la 14-a, 15-a kaj 16-a de marto 2014. Lecionoj estos matene dum 2 horoj kaj posttagmeze dum 2 horoj. La lernantoj povos dum la 3 tagoj komune lunĉi en itala restoracio. Ĉiu devas mem prizorgi sian eventualan tranoktadon. Aliĝkostoj nur por la kurso estas 35 eŭroj, pagendaj al la IEI konto ĉe UEA: iein-q kun mencio „seminario” aŭ al nia konto *162626 Internationaal Esperanto-Instituto, Den Haag*. Pliajn informojn donos la organizanto *Ed BORSBOOM*: tel 030-2202673 aŭ *ed.borsboom@versatel.nl*.

Orienta Timoro



En IPR 2013/3 p. 35 aperis erare fotoj pri agado de Heidi GOES en Indonezio. Jen estas fotoj de ŝia agado en Dilio, la ĉefurbo de Orienta Timoro.

Sur la foto maldekstre vi vidas la radio-prezentistojn dum la unua leciono. Ili spektas parton de 'Mazi en Gondolando'.

La grupa foto sur la sekva paĝo estas farita ekster la konstruaĵo de la nacia radio kaj televido kaj montras tiujn, kiuj kunsidis ĉe la fino de la restado de Heidi. Dum tiu kunsido ili elektis kunordiganton, Nuno Saldanha.



Nekrologo

A. (Ton) VERWOERD (4 junio 1930 - 7 septembro 2013) Nederlando



De 7 jaroj senpova forpasis la bazlerneja instruisto Ton VERWOERD, kiu nur en 1987 remalkovris kaj tutlernis Esperanton, al kies instruado li dedicxis sian plenan energion. Vere entuziasma Ton VERWOERD fariĝis pro tri provlecioj de Audrey Childs-Mee kaj la sukcesa jarkurso de Ko HAMMER (1988) al 18 lernantoj el lia klaso. Provinde plurajn porinfanajn kursojn li evoluigis la propran kaj post la aliĝo de Marianne VAN GEMERT, lerta gvidanto de infankoruso kaj ludil-

kreanto, ĉiel provis instrui Esperanton al la posta generacio, laŭ li la plej grava aktivado. La geinstruantoj multe variigis la lernadon per kantoj, dancoj, rolludoj, desegnado (por eksterlandaj ekspozicioj aŭ konkursoj), klasa korespondado (Bulgario, Rusio, Usono, Rumanio...; la infankluba revueto *Trans la limon* disiris tra la mondo) kaj per infanfestoj, sed ankaŭ per internaciaj eventoj, kiel Internaciaj Infanaj Kongresetoj. Dekomence li kunlaboris kun Charlotte KOHRS (Usono, *Infanoj ĉirkaŭ la mondo*) kaj fine ebligis al la rumano Mihai TRIFOI partopreni en la projekto *Fundapax*: Tiu invitis lin al Bixad kaj ĉe la tria fojo (1997) ili kune kombinis komputil-lecionojn kun E-o (kiel poste okazis por indiĝenaj etnoestroj en Nederlando: *Indiĝenaj Dialogoj* (2000)).

Por NGGE li fariĝis estrarano pri infaninstruado 1991-1996.

En lia verkaro aperas:

- 1988 „Dudek kvin kantoj kaj poemoj”
- 1992 „La Jozefidoj kantas”
- 1993 „Esperantaj kantoj”
- 1996 „Vivu la kanto / 45 porinfanaj kantoj en Esperanto kun muziknotoj kaj didaktikaj sugestoj”
- 1990 „Kiel papilioj: dulingvaj mallongaj rakontoj de nederlandlingvaj verkistoj” (kunlabore kun NEJ, Nederlandaj E-Junuloj)
- 1990 „Oreroj el Nederlando: dek ses porinfanaj poemoj” (la unuaj du en traduko de Nora BARTELS)
- 1993 (aprilo) „Kiel instrui Esperanton al infanoj hodiaŭ”
- 1994 „Mondiaal”, lia ĉefa kurso.
- 2000 „Lerni ludante I-II” (pri lud-lerniloj, vidu IPR 2000/1 kaj 2).

La lokan klubon li servis kiel redaktoro kaj sekretario, krome li sukcesis efektiviĝi Esperanto-benkon kaj alian E-monumenton ĉe la strato Zamenhof (sukcesa propono de Nora BARTELS). En la ĉiam allogaj kurso-semajnfinoj de Nederlanda E-Asocio li instruis i.a. krei hajkojn.

Poste li engaĝiĝis ankaŭ por la agado de la samurba Jacques TUINDER: *Evidente* (kontraŭ nenecesa blindeco, ĝenerale helpe al vidhandikapitoj en la plej malriĉaj landoj) kaj helpe al Hans BAKKER por la *Lernejo en Togolando*. Ankaŭ la agado kontraŭ soldatigo de infanoj trovis varman pledanton en Ton: aperis plurlingva broŝuro pri ĝi.

Ĉe lia funebro parolis Rob MOERBEEK, kiu ankaŭ tradukis la alparolon de „la frato de Ton”, Mihai TRIFOI, nur tiucele ĵus alveninta el Rumanio, kaj Joke HOOBROECK.

Ton kontribuis abunde al la E-vivo en la lando. Kvankam li apenaŭ plu reagis al nederlandlingvaj alparoloj de vizitantoj, tamen voĉlego de *Dialogo* de Julia SIGMOND en E-o trovis lian viglan atenton: lia lasta leciono al mi: 'malgraŭ mia afazio-handikapo prenu min serioze!'

Rob MOERBEEK

Raporto por ILEI rilate al la Ĝenerala Konferenco de UNESCO 2013

Okaze de la 37a Ĝenerala Konferenco de UNESCO okazinta en Parizo de la 5a ĝis la 20a de novembro reprezentis la Ligon ILEI Monique ARNAUD kaj Jean-Pierre BOULET dum la unua parto: Edukado. Ĝiaj ĉefaj temoj estis, edukado al civitaneco, edukado por daŭra evoluo, edukado por ĉiuj laŭlonge de la vivo, fortigo de sana edukado, protektado de la kultura kaj natura heredaĵo, aŭtonomigo de virinoj, samrajteco en digno por ĉiuj, problemoj pro la klimataj ŝanĝiĝoj, kulturo kiel motoro de evoluigo...

Ĉiu lando raportis dum 6 minutoj pri siaj celoj, atingoj kaj problemoj atentigante ĉefe pri kvalito de la instruado, trejnado de instruistoj, senpageco, teknika kaj teknologia lernado praktike uzebla profesie en naskiĝontaj industrioj. Kelkaj landoj parolis pri originalaj spertoj; ekzemple en Senegalo multaj gepatroj preferis sendi siajn gefilojn al la koranaj lernejoj. Fine estis konsento ke la korana instruado okazu ĉe la ŝtataj lernejoj sed laŭlonge de 8 jaroj lasante tempon por aliaj studoj kaj donante motigon por sendi la infanojn dum 8 jaroj.

Multaj landoj raportis pri la ITC (*Teknikoj de Informado kaj Komunikado*). Ĉirkaŭ 175 delegitoj parolis. Ni povis aŭskulti pli ol 160 reprezentantojn kaj se ni aŭdis nur unu fojon la ĉinan lingvon, ni aŭdis 76 fojojn la anglan, 36 fojojn la francan, 20 fojojn la hispanan, 15 fojojn la araban, 7 fojojn la rusan, 2 fojojn la portugalan, unu fojon la turkan; kelkaj uzis samlonge la francan kaj la anglan kaj estris delegaciojn 32 virinoj.

Niaj reprezentantoj vizitis kvardekon da delegacioj disdonante flugfoliojn en la 6 oficialaj lingvoj de UNESCO kaj kelkajn en la itala (Italujo kaj Vatikano), sin prezentante en diversaj lingvoj kaj dankante eĉ en la araba. En kelkaj delegacioj la reprezentantoj malkovris la ekziston de la lingvo *Esperanto* kaj interesiĝas pri ĝi, do ni disdonis al ili la pli ampleksan dokumenton.



*De maldekstre: Jean-Pierre BOULET (ILEI), François LO JACOMO (UEA)
Patrick GALLAUD, Monique ARNAUD (ILEI), Renée TRIOLLE (UEA)*

Monique ARNAUD (Francio), <monique.arnaud@aliceadsl.fr>

Recenzo

*Modernaj edukaj metodoj kaj teknologioj; resumo pri prezentaĵoj en
KAEST 2012. Eld. E@I, Slovakio 2013. Red: Peter Balaž, Katarina
Nosková, 240p. 21cm. ISBN 987-80-89366-21-7. Prezo ĉe UEA: €9,00.*

Unue, kio estas KAEST? ‘Konferenco: Apliko de Esperanto en Scienco kaj Teknologio.’ Tiu okazas regule tra deko da jaroj, unue en Ĉeĥio, nun en Slovakio. La sesio de novembro 2012 havis la temon rekte interesan por instruistoj kaj ILEI, kies kvino da estraranoj partoprenis la tri-tagan aranĝon.



Komence aperas resumo pri la nunaj agadoj de E@I, sekvas resumoj de 19 pritemaj prezentaĵoj kaj 10 alitemaj. Ĉiu el ili havas kelklinian naci-lingvan resumon en la angla kaj slovaka kune kun biografi-aj notoj kaj foto de la kontribuinto. Du referaĵoj aliris la temon vaste: Peter BALÁŽ starigas la demandon: ‘Moderna edukado – ĉu tempo por ŝanĝo de paradigmoj?’ Respondon donis Katarina NOSKOVÁ per ‘Lingvolernado per modernaj interretaj teknologioj: specifecoj, avantaĝoj kaj tiklaj punktoj’.

Okazis kelkaj prezentaĵoj pri retaj lerniloj, ekzemple ‘ViVo’ kaj ‘Kono’ (ambaŭ de Bart DEMEYERE), ‘Duolingo’

(Miroslav HRUŠKA), retkursoj ĉe *edukado.net* (Katalin KOVÁTS) kaj *Muzaiko* (Veronika POÓR). Du prelegoj temis pri specifaj instrumentoj: ‘BEK-umado’ (Magdalena FEIFIČOVÁ) kaj la Zagreba metodo (Zlatko TIŠLJAR).

Du intervenoj liveris superrigardojn pri kursoj aperintaj aŭ aperantaj: La unua estas la 32-lingve presita kurso ‘Esperanto per rekta metodo’ de Stano MARČEK; la dua estas la retkurso ‘Esperanto etape’ (pli frue nomita e125) de Stefan MACGILL. Interese, ili donas respektive 22 lecionajn resumojn kaj 26 etapajn resumojn, do eblas tuj kompari la malsaman vicordigon de la materialo, frape malsaman ekzemple ĉe la demandovorto ‘Ĉu’, kaj specifa trakto de la kategorioj de la verbo (transitiva/netransitiva).

Klarigis pri Vikipedio en Esperanto Marek BLAHUŠ; pri E-agado inter triaĝuloj Petr CHRDLÉ, pri la E-lernejo ĉe Eventoj en Budapeŝto László SZILVÁSI, pri la Biblioteko en la E-urbo Herzberg Zsófia KÓRÓDY kaj pri eduk-terminologiaj problemoj Miroslav MALOVEC. Iomete parenca al terminoj estas onomatopoeoj kaj interjekcioj en Esperanto (prezento de

Konstantin TIĤOMIROV) kaj vortaroj – pri kio prelegis Vinko MARKOVO, sub la titolo ‘La radikoj de la Plena Ilustrita Vortaro kaj ilia kontribuo al la eduka rolo de SAT’.

Entute la libro eternigas la prezentaĵojn el valora densprograma renkontiĝo. Kaj la eldonaĵo kaj la renkontiĝo estas ambaŭ rekomendindaj.

Stefan MACGILL (Hungario), <Stefan.Macgill@gmail.com>

Informoj pri ILEI

Laborkomisionoj (reviziota)

Ekzamena: Karine Arakelian (prezidanto), Mónika Molnár (vicprez.), Mireille Grosjean, Leysester Miro, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Tiekō Isikawa, Ana Montesinos de Gomis.

Kontrolo: Ulla Luin, Simon Smits, Rudi Koot.

Lerneja: Julián Hernández (gvid.), Carola Antskog, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Tiekō Isikawa, Marija Jerković, Luigia Madella, Jacqueline Poux, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas, Stefan MacGill (Estrare: Mireille Grosjean).

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny (Estrare: Mireille Grosjean).

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Aida Čížikaitė, Renato Corsetti, Ilona Koutny, Radojica Petrović, Kristin Tytgat.

Kunlaborantaj institucioj

EEU: *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, *cantskog@kolumbus.fi*.

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Viťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, *info@ikso.net*. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj
Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74. NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando.
Retadreso: *redaktanto@edukado.net*.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49)55215983, Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, *zsafia.korody@esperanto.de*.

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Petra Smidéliusz**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, www.uea.org.
Reprezentanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Stefan MacGill**.

UN: komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leyeester Miro**.

UNESKO (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@aliceadsl.fr; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60.

Membreco kaj pagado por aliaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj**, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas **10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj**. Bonvenaj estas donacoj al la fondaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por *Juna amiko*. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande.

Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. [<ilei.kasisto@gmail.com>](mailto:ilei.kasisto@gmail.com).

La pagoj povas okazi pere de la nederlanda ILEI-konto aŭ al la ILEI-konto ĉe UEA:

* Pagoj al la nederlanda konto de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bv. aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo).

* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldono de sumo por bankkostoj. Indiku viajn nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-l (*Juna amiko*).

* Simpla abono de IPR sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por IPR: 180 € por plena, 110 € por duona kaj 70 € por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Hejmpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Iwona KOCIEBA, *Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem*. **Presado**: Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio*, tel: (+32-3)-234 34 00. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, [<jozefo.nemeth@gmail.com>](mailto:jozefo.nemeth@gmail.com), <http://www.ilei.info/ipr/>; tel: (+36-70) 931-0530. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk*, [<moerbeekr@gmail.com>](mailto:moerbeekr@gmail.com).

La nunan numeron ni sendis al la presejo la 8-an de decembro 2013,
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de januaro 2014.

Lingva justeco en praktiko: latinamerikaj spertoj kaj tendencoj

La 47-a konferenco de ILEI celebros la 60-jariĝon de la unua rezolucio de Unesko pri Esperanto. En la lumo de la strategia plano de UEA kaj ĝia ĉefmotivo, *la lingva justeco*, ILEI prikonsideros la principan gravecon de ambaŭ uneskaj rezolucioj pri Esperanto, el Montevideo, 1954, kaj Sofio, 1985, kaj iliajn praktikajn utilojn kaj utiligojn por la E-movadaj celoj kun precipa atento pri la spertoj kaj tendencoj en Latinameriko kiel gastiganto de la Konferenco kaj UK en la jubilea jaro. Du urugvajaj ministerioj kaj aliaj institucioj oficiale deklaris sian apogon al la Konferenco.

Konferencejo kaj hoteloj

La konferenco okazos en moderne ekipitaj salonoj de la belega konstruaĵo de *Ateneo*, en la urbocentro. *Ateneo* estas longtradicia urugvaja kultura institucio fondita en la jaro 1886, do preskaŭ samaĝulo de Esperanto. Ĝia laŭstatuta celo etas, koncizigite: „servi, en la etoso de absoluta spirita libero, al evoluigo de kulturo, promocii ĝian disvastigadon per libera diskuto pri ĉiuj principoj kaj tendencoj, kaj kontribui al defendo de ĝiaj principoj per ĉiuj legitimaj rimedoj servantaj al la vero kaj justeco” – jen tute adekvata okazejo kaj idea kadro por niaj diskutoj.

En promendistanca ĉirkaŭaĵo de la konferencejo troviĝas pluraj favorprezaj restoracioj, hosteloj kaj hoteloj ofertantaj ĉambrojn kun matenmanĝo, sendrata interreto kaj aliaj komfortaĵoj. Pliaj detaloj por loĝ- kaj manĝmendoj estos publikigitaj en la retejo de ILEI kaj alimaniere.

Programskemo, ekskursoj kaj transporto al UK

La akcepto kaj loĝigo okazos sabaton posttagmeze, la 19-an de julio. La programo inkluzivos klerigajn erojn, laborkunsidojn, diskutsesiojn, lingvan festivalon, simpozion pri la konferenca temo, ekskursojn kaj vesperan distran programon. Viaj kontribuproponoj estos bonvenaj.

Urugvajo proponas abundon da historiaj, kulturaj kaj geografiaj vidindaĵoj kiel konferencajn ekskurscelojn, ekzemple: vidindaĵoj de *Montevideo* mem, *Punta del Este*, *Colonia del Sacramento*, *Durazno* k.c. kun farmbienoj, vinejoj, muzeoj, bestoĝardeno... Fine de la konferenco, vendrede la 25-an de julio, estos organizita kelkhora transporto al UK per buso kaj / aŭ ŝipo.

Radojica PETROVIĆ, estrarano pri konferencejoj

Aliĝilo

por la 47-a konferenco de ILEI, Montevideo, 19-25/07/2014

- Persona nomo _____
Familia nomo _____ ☐ Ino ☐ Viro
- Datoj (jjjj-mm-tt) de: alveno _____ foriro _____
- Lando _____ Kodo, urbo _____
Loĝadreso _____
Retadreso _____ Fakso _____
Telefono _____ Poŝtelefono _____
- Naskiĝdato (jjjj-mm-tt) _____ Profesio _____
- Mi kotizas _____ EUR kiel (elektu unu el la kotizkategorioj laŭ la kotiztabelo sur la sekva pagxo):
☐ membro de ILEI, ☐ ne-membro, ☐ junulo, ☐ handikapulo.
- Mi kontribuas _____ EUR por ILEI-agado tra jena(j) kaso(j) / fonduso(j) / agado(j): _____
- Mi konsentas / ne konsentas (forstreku unu) ke mia adreso aperu en la listo de partoprenantoj!
- Mi komprenas, ke la aliĝo validas nur post kompleta pago en unu el la jenaj manieroj (indiku vian pagmanieron):
☐ Al ILEI-konto ĉe ING-banko, IBAN: NL55INGB 0004676855, BIC: INGBNL2A. Aldonu 5 € se vi pagas de ekster Eŭropa Unio.
☐ Al ILEI-konto ĉe UEA *ilek-a*, indikante "ILEI-konferenco 2014"
☐ Ene de Urugvajo, bonvolu komunikigi kun LKK tra s-ino Sonia Risso <sonry@adinet.com.uy >.
- **Mi komprenas kaj akceptas la partoprenkondiĉojn kaj regulojn el la Konferenca Regularo de ILEI, punktoj 6 - 9 (ilei.info/dok/regularo_konferencoj.rtf?lingvo=eo)**
- Mi bezonas / ne bezonas inviton (Pasporto n-ro _____ de la ŝtato _____ valida ĝis _____).

Mi proponas jenan kontribuon al la konferenca programo:

Loko, dato _____ Subskribo _____

Kotizoj

- A. Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B.
B. Ekssocialismaj landoj de orienta Eŭropo; landoj de Latinameriko, Afriko, kaj Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko).

Aliĝperiodo:	ĝis 31.03.2014		ĝis 30.06.2014		post 30.06.2014	
Aliĝkategorio:	A	B	A	B	A	B
Membro de ILEI(1)	50 €	30 €	60 €	35€	70 €	45 €
Ne-membro	65 €	40 €	75 €	45 €	90 €	55 €
Junulo(2), handik. (3)	25 €	15 €	30 €	20 €	35 €	25 €

- (1) Membro estas tiu, kiu jam pagis kotizon al ILEI por la jaro 2014;
(2) Junulo: kiu naskiĝis post la 31-a de decembro 1984.
(3) Handikapulo. Bonvolu sendi al ILEI atestilon.

El la Konferenca Regularo

6. Konferencanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Konferencan Regularon aŭ malutilas al la ILEI-Konferenco kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas ILEI-Konferenco. [...]
7. Ĉiu vendado de varoj en ILEI-Konferenco bezonas antaŭan aprobon de la Estraro, kiu starigas la kondiĉojn. Skriba peto pri tia agado estu liverita al la Estrarano pri Konferencoj nepre antaŭ la 30-a de junio de la konferenca jaro.
8. La Estrarano pri Konferencoj rajtas haltgi ĉiun agadon koncerne ILEI-Konferencon, kiu ne konformas al ĉi tiu Regularo. [...]
9. Principe la ĉefa administrado kaj librotenado de ILEI-Konferenco estas prizorgata de la Kasisto de ILEI. Al tiu oni sendas la aliĝojn kaj mendilojn [...].

Viajn aliĝilojn bonvolu sendi paperpoŝte aŭ rete (skanaĵon aŭ elektronikan aliĝilon) al la kasisto de ILEI:

William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>

La elektronikan aliĝilon vi trovos en la retejo de ILEI: www.ilei.info sub Agado → Konferencoj → Konferenco 2014.

Bonvenon!



La ĉefa sidejo de UNESKO en Parizo (vd p. 5 kaj p. 35)



Interlingvistikaj Studoj en Poznana – nova starto en 2014 (vd p. 9)

